

2

1972

8,— Ft

0,5 $

E

HUNGARA VIVO

Balatonvilágos

Budaörs

KORE NI ATENDAS NIAJN KARAJN AĈETANTOJN ĈE NIAJ BENZINSTACIOJ



Fonyód

Szarvas

Balatonederics

ÁFOR
BENZIN-OLAJ

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Budapest VIII, Kenyérmező utca 6.

ENHAVO

HEA: BONVENON! 1
Sz. Bálint: Praktikaj informoj . . 2
P. Balkányi: Memorigiloj pri e-istoj en Bpeŝto 3
J. Mátéffy: Pri la festivalaj ekskursoj 4
gm.: Aladár Farkas 6
Gy. Sípos: Poemoj, Tr. M. Fejes . 6
gm.: István Barta 7
Anna Pardi: Poemoj. Tt. K. Kalocsay 7
Ferenc Karinthy: Bösendorfer. Tr. K. Kalocsay 8
Humuro 10
Panoramo 12
É. Tófalvi: Pécs 14
gm.: I. P. Nolipa 16
V. Benczik: L. Tárkony 70-jara . 16
gm.: Ágnes Lukács 17
gm.: Z. Váli 18
gm.: P. Varsányi 19
L. Tárkony: Tririmoj 19
L. Lesznai: Ĉapitroj el la hungara muzikhistorio II. . . . 20
Sukcesa turneo de la Hungara Radio-orkestro en Usono . . . 20
Gy. Mikes: Bibliotek-ordigado. Tr.: K. K. 22
Infanbuŝo 23
Interesaĵoj 23
L. Tárkony: Revuo de Revuoj . . 24
L. Kökény: La miljara Székesfehérvár 26
Forumo 26
Nur por virinoj 26
—eta—: Coffea arabica 28
Menciinde 28
G. Ősz: Hungara Ŝtata Pupteatro en Zagreb 29
I. Szenes: Kiu bone scias arablingve 29
FERI: Nia jardeko. Krucvortenigmo 30
„Ĉu ekzistas vivo post naskiĝo?" (A. Szent-Györgyi) 31
Leterkesto 32

Bonvenon!

Hungario, lando en Karpat-baseno, ampleksa je 93 mil km², kun pli ol 10 milionoj da loĝantoj bonvenigas ĉiujn amikojn vizitantojn de ĝiaj por turistoj ĉiam karmemoraj regionoj. Dum Esperanto-Semajnoj en julio ni montros al la Eŭropa esperantistaro kulturajn valorojn de nia popolo, kiu komence kiel fremda, finno-ugra ekloĝis sur teritorio de la fekunda Karpat-baseno, kaj dum jarcentoj akiris por si lokon kaj renomon inter la hindo-eŭropaj popoloj de Mezeŭropo. Ĉirkaŭata de fremdlingvaj popoloj kaj spite al invado de mongoloj, turkoj, poste sub la jugo de Habsburgoj ni konservis nian lingvan kulturon. Por ĉi popolo en konstanta konekso kun la fremdlingvaj najbaroj la ideo de komuna lingvo ĉiam estis simpatia sen rezigno pri lingva kaj kultura sendependeco. Tial akceptis ĝoje kaj gastame ne nur la hungara esperantistaro, sed la tuta hungara popolo la alvenintajn kvar-kvin mil esperantistojn el la tuta mondo, kiuj venis al Budapeŝto denove prezenti dum la 51-a „Granda" Universala Kongreso al la mondo la vivkapablecon de la internacia esperantista movado, kaj samtempe pruvi al la „dubantoj", ke Esperanto estas lingvo vivanta, uzebla kaj por kongresi pri gravaj temoj, kaj por sciencaj diskutoj de fakuloj diversnaciaj, eĉ estas taŭga esprimi sentojn-pensojn plej profundajn, havas vivan, riĉan internacian literaturon. Fiere ni citas el UEA-raporto en „Esperanto" pri la Tria Internacia Arta Festivalo: „Ĝia riĉa enhavo plu levis la kulturan nivelon de la Universalaj Kongresoj kaj la prestiĝon de Internacia Lingvo." „La nomo Budapest delonge portas por Esperanto tute apartan signifon. Ĝi ja estas la centro de tiu literatura skolo, kiu post Zamenhof kaj Grabowski plej multon kontribuis al la maturiĝo de Esperanto."

Kion pli post tiaj antaŭsignoj? Ĉu Esperanto-Semajnoj en Hungario same havos por la partoprenintoj belajn rememorojn?

Ni esperas. La X-a jubilea sesio de Somera Esperanto-Universitato en Gyula de la 9-a ĝis la 15-a de julio krom la variaj amuzeblecoj, refreŝigaj ripozoj kaj ekskursoj certigos prelegojn fare de eminentaj fakuloj.

Ĉu Vi konas la hungaran literaturon?

Dum la Hungara Kultur-Festivalo ni prezentos al la partoprenantoj perlojn de hungara literaturo. Verkojn de hungaraj verkistoj kaj poetoj certe Vi jam konas el numeroj de Hungara Vivo. Por refreŝigi Viajn konojn certe Vi trarigardis ilin, kaj estos ĝoje pli profunde konatiĝi kun la verkoj de ekŝatitaj reprezentantoj de hungara literaturo. Ni zorgos ankaŭ pri la amikoj de muziko. En la prezento de eminentaj orkestroj kaj muzikartistoj Vi aŭdos ĉi tie verkojn de Liszt, Bartók, Kodály ktp. certe ŝatataj ankaŭ de vi. Ni ne forgesis ankaŭ pri la amikoj de belarto kaj de naturo. Specialaj ekskursoj al muzeoj, ekspozicioj kaj artmonumentoj garantios la pliriĉigon de Viaj konoj.

Ekskursoj al Danub-kurbiĝo, Balatono kaj provinco, krom la 5-a Internacia Renkontiĝo de Naturamikoj en Abaliget, certigos eblecon spiri freŝan aeron en la plej belaj regionoj de nia lando.

Fartu bone ĉe ni, kaj ne forgesu pri la produktoj de hungaraj kuir-arto kaj vinber-kulturo.

Hungara Esperanto-Asocio

PRAKTIKAJ INFORMOJ

Hungara monsistemo: 1 Forinto = 100 fileroj.

Ekzistas moneroj de 10, 20, 50 fileroj kaj de 1, 2, 5, 10 forintoj. Monbiletoj uzataj estas de 10, 20, 50, 100 kaj 500 forintoj. Monŝanĝejo de IBUSZ funkcias ĉiutage ĉe la stacidomoj kaj en grandaj hoteloj; nur dum labortagoj dise en la urbo ĉe la filioj de MNB (Hungara Nacia Banko) kaj OTP (Tutlanda Ŝparkasa Banko); fine en diversaj Fremdultrafikaj Entreprenoj.

VETURADO EN BUDAPEŜTO

En Budapeŝto oni povas veturi per aŭtobusoj, akvobusoj, trolebusoj, tramoj, dentrela tramo al Szabadsághegy (monto), substrata tramo kaj subtera tramo — METRO — kaj per antaŭurbaj fervojoj. La surstrataj kaj dentrelaj tramvagonoj estas flavaj, la trolebusoj estas ruĝaj, la enurbaj aŭtobusoj estas bluaj, akvobusoj estas blankaj kaj la vagonoj de METRO kaj la antaŭurbaj fervojoj estas verdaj.

VETURTRAFIKOJ, HALTEJOJ, TAKSIOJ

Oni povas aĉeti liniobileton flavan kontraŭ 1,— forinto, kaj bluan kontraŭ 1,50 forintoj, en tabakvendejoj surstrate kaj ĉe la finhaltejoj de la veturiloj. La flava estas valida por surstrataj, substrataj tramoj kaj trolebusoj, la blua por aŭtobusoj. En ĉiuj ĉi ekzistas trapika maŝino, oni enmetas la bileton, kaj farigas truon por ĝin validigi. Per ĝi oni povas veturi unufoje per la sama veturilo en la sama direkto. Por METRO oni devas enŝovi 1 forinton en fotoĉelan aparaton, tiam ĝi permesas liberan vojon por la atingo de la moviĝanta ŝtuparo. La akvobusoj, dentrada tramo, kaj antaŭurbaj fervojoj havas propran giĉeton por bilet-aĉeto.

Haltejoj por tramoj, trolebusoj estas indikitaj per literoj M kaj MM. La duoblaj literoj signifas, ke tie povas halti 2 tramoj. Ĉe la haltejoj malgrandaj blankaj tabuletoj indikas la numerojn kaj finstacion de tramoj kaj trolebusoj trafikantaj sur tiu linio.

Aŭtobushaltejoj estas indikitaj per stangoj kun mallarĝaj longaj tabuletoj, sur kiuj troviĝas blua surskribo „Autóbusz".

Metrohaltejoj estas signitaj per heligita granda litero M super la konstruaĵo de la enirejo.

Taksioj estas duspecaj, unuj estas signitaj ambaŭflanke per longa mallarĝa strio konsistanta el ruĝaj-blankaj kvadratetoj. Aliaj havas sur la unua parto de tegmento surskribon „TAXI" kaj ambaŭflanke surskribon „VOLÁN".

Atente transiru ĉe la vojkruciĝoj. La ruĝa koloro de la signalilo signifas malpermeson por la transiro, la flava koloro signifas atenton antaŭ la transiro, kaj la la verda koloro liberan vojon por transiro. Se iu policisto rimarkas malobeanton, tiu devas pagi 50—100 forintojn, eĉ eksterlandano.

POŜTA TARIFO

Letero: de norma dimensio enlande 1 forinto. Letero dimensio de nenorma enlande 2 forintoj. Al okcidentaj landoj la leteroj kostas 3 forintojn, al popoldemokratiaj landoj — escepte de Rumanio — se ĝi estas normalpeza, ĝi kostas 1 forinton. Poŝtkarto sen bildo enlande kaj al Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Pollando, D. D. R., Sovetunio, Vjetnama Dem. Resp. kostas 60 filerojn, al aliaj landoj 2 forintojn. Bildkartoj kostas enlande 40 filerojn, al socialismaj landoj 60 filerojn, al aliaj landoj 2 forintojn. Registrigo: enlande 3 forintoj, eksterlanden 4 forintoj. Aerpoŝtaj sendaĵoj: la tarifo varias laŭ landoj kaj pezo de la sendaĵo.

TELEFONADO

Ekzistas duspecaj publikaj telefonĉeloj: unu funkcias per telefonmonero „tantus", vi povas ĝin aĉeti en poŝtoficejoj, tabakvendejoj por 1 forinto, la alia funkcias nur per simpla 1 forinto. Surstrate kaj en tabakvendejoj estas troveblaj multe da telefonstacioj.

Kiel telefoni?

La manipulado de la aparato estas la jena: 1. Dekroĉu kaj poste metu la aŭdilon al la orelo. 2. Faligu la telefonmoneron tra la supra fendeto en la aparaton. 3. Post la falo de la monero vi aŭdas monotonan zumadon, kio signifas, ke vi povas serĉi la kontakton per la cifer-komutilo al la dezirata telefonnumero. 4. Farinte tion, vi aŭdas la sonorilvokon de la alia aparato.

Se la vokita aparato ĝuste tiam estas okupita, ĉar iu alia per ĝi parolas, la kontaktiĝo ne povas okazi. Tion signas rapide ripetiĝantaj mallongaj sonoroj. Aŭdinte ilin, rekroĉu la aŭdilon kaj la aparato elfaligos malsupre la enmetitan telefonmoneron. Post mallonga tempo bonvolu ripeti la alvokon.

OFTAJ SURSKRIBOJ

Áruház — Magazeno, Nagyáruház — Granda Magazeno, Közért — Spicvendejo, Csemegebolt — Delikatajvendejo, Cipőbolt — Ŝuovendejo, Kávéház — Kafejo, Italbolt — Trinkejo, Espresso — Kaftrinkejo, Tejcsarnok — Laktovendejo, Borozó — Vintrinkejo, Söröző — Bierejo, Önkiszolgáló étterem — Memserva restoracio, Gyógyszertár — Apoteko, Ruhatár — Vestgardejo, Virágért — Florvendejo, Dohánybolt — Tabakvendejo, Játékbolt — Ludilvendejo, Húsbolt — Viandvendejo, WC férfiak — Necesejo por viroj, WC nők — Necesejo por virinoj.

GRANDAJ MAGAZENOJ

Corvin: Bp. VIII., Blaha Lujza tér 1—2, Divatcsarnok: Bp. VI., Népköztársaság útja 39., Lottó Áruház: Bp. VII., Rákóczi út 36., Otthon Áruház: Bp. VII., Rákóczi út 76., Úttörő Áruház: Bp. V., Kossuth Lajos u. 9., Kálvin téri Áruház: Bp. IX., Kálvin tér 7. Fine en ĉiuj partoj de la ĉefurbo estas troveblej Magazenoj de Centrum.

POPOLARTAJ VENDEJOJ

En div. distriktoj: V. Kossuth Lajos u. 2., V., Váci utca 14., VI., Lenin körút 84., VII., Lenin körút 5., VII., Lenin körút 38., VII., Rákóczi út 53., XIII., Szent István körút 26.

RESTORACIOJ, BUFEDOJ, SUKERAĴEJOJ

Ekzistas en kvin klasoj: luksaj (superklasaj) kaj I—IV.-klasaj. Ili estas troveblaj en ĉiu distrikto de la urbo. La plej malmultekostaj estas la memservaj restoracioj, kie oni povas elekti ankaŭ dietajn manĝaĵojn.

ĈEFSTACIDOMOJ FERVOJAJ

Keleti pu. — Orienta stacidomo, Bp. VIII., Baross tér, Nyugati pu. — Okcidenta stacidomo, Bp. VI., Marx tér, Déli pu. — Suda stacidomo, Bp. XII., Alkotás utca. Krom tiuj ekzistas en Grand—Budapeŝto kelkdeko da stacidomoj kaj fervojaj haltejoj.

AERNAVIGADO

de MALÉV Hungara Aertrafika Entrepreno, centra oficejo: Bp. V., Dorottya u. Flughaveno: Ferihegy.

MUZEOJ

Magyar Nemzeti Múzeum — Hungara Nacia Muzeo, VIII., Múzeum körút 14—16. Konstruita en neo-klasika stilo; antaŭ ĝi staras la monumento de la granda poeto János Arany. — Szépművészeti Múzeum — Belarta Muzeo, XIV., Hősök tere. Konstruita en klasika stilo. En ĝi estas videbla unu el la plej riĉaj belart-kolektaĵoj de Eŭropo. — Iparművészeti Múzeum — Metiarta Muzeo, IX., Üllői út 33—37. Konstruita en karakteriza hungara-secesia stilo. — Néprajzi Múzeum — Etnografia Muzeo, VIII., Könyves Kálmán körút 40. — Nemzeti Galéria — Nacia Galerio, V., Kossuth Lajos tér 12. — kun la majstroverkoj de elstaraj hungaraj pentroartistoj.

ĜENERALAJ SCIINDAĴOJ

Ĉe la barbiro: razado — 2—5 forintoj plus trinkmono 1—2 forintoj; hartondado — 4—10 forintoj plus trinkmono 1—2 forintoj. Ĉe la frizisto: harordigo por virinoj 12—25 forintoj plus trinkmono 2—3 forintoj. Pakaĵportisto: ĉe la stacidomo por kiu ajn pakaĵo senkonsidere la pezon: 2 forintoj, por ĉiu plia pakaĵo 1,50 Ft. Ŝupurigisto: ĉefe estas trovebla ĉe stacidomoj: 3—5 forintoj. En restoracioj: oni donas ĝenerale — en memserva restoracio nenion — al la ĉefkelnero kiel servomonon proksimume 10%-ojn de la pagenda sumo.

Szilárd Bálint

Memorigiloj pri esperantistoj en Budapeŝto

La gastojn de nia kulturfestivalo en julio eble interesos, ke en malmultaj urboj de la mondo troviĝas tiom da publikaj memorigiloj pri esperantistoj, kiel en Budapeŝto.

Bedaŭrinde pri Zamenhof kaj Esperanto — lia pseŭdonimo — estas nomitaj nur stratoj periferiaj: en iamaj vilaĝoj, nun apartenantaj al Granda Budapeŝto. Sed en bela loko, ĉe la Elizabeta ponto, de post la kongreso en 1966, troviĝas ŝtono kun surskribo Esperantoparko en Buda, antaŭ Kuracbanejo *Imre*.

Eksterlanda esperantisto havas indan straton en la kvara kvartalo nomata Ujpeŝt havanta nun 80 000 loĝantojn: li estas *Valdemar Langlet*, kiu, lektoro de la sveda lingvo ĉe la Universitato, multe klopodis dum la teruroj de la nazia regado, kunlabore kun la sveda legacio, por provi savi de la gaskamero multajn homojn, kaj poste, kunlabore kun la sveda Ruĝa Kruco, li helpis savi la loĝantaron kontraŭ epidemio kaj malsato.

Belan straton, kun marmortabulo, havas en Buda la fama verkisto, poeto kaj humuristo *Frigyes Karinthy*. De post mia neforgesebla vizito ĉe li en 1918 li fariĝis entuziasma adepto de Eo: en multaj siaj paroladoj, gazet-artikoloj, ankaŭ en alparolo en la Internacia Pen-kongreso li pledis por akcepto kaj uzado de Eo. Poste li fariĝis efektiva prezidanto de la Hungara E-Societo.

Ne malproksime de la Karinthy-strato havas sian straton *Árpád Szakasits*, politikisto, gvidinto de la socialdemokrata partio, ĵurnalisto, verkisto kaj kelktempe ankaŭ prezidento de la hungara popolrespubliko. Li mem rakontis, ke junaĝe li entuziasme lernis Eon ĉe la junlaboristoj kaj arde atendis dum korespondado respondon ekz-e el Japanujo. Al la MEM-konferenco okaze de la UK en Sofio li sendis tre amikan, instigan mesaĝon, en la Hungara Landa Kongreso en 1962 li faris la festparoladon, alvokante precipe la junulojn por la lerno kaj uzo de Eo.

Kompreneble honorajn memorigilojn ricevis tiuj hungaraj esperantistoj, kiuj sinofere agis en la komunista partio, tiutempe neleĝa, kaj en la antifaŝisma batalo: ili fariĝis martiroj de la popolo. Unuavice ni menciu la nomon de *Katarina Hámán*, konvinkiĝinta kaj tre aktiva esperantistino, kiu instruadis la lingvon kaj fariĝis eĉ gvidanto de la Hungaria E-Laborista Societo. Ŝi mortis, 53-jara, en 1936. Ĉar ŝi laboris ĉe la Ŝtataj Fervojoj, ŝia busto estas videbla ĉe la flanko de la Okcidenta Stacidomo en Budapeŝto. Alia martiro estas *Gyula Kulich* fervora korespondanto kun multaj landoj, interesiĝanta pri la laboristaj vivoj kaj sortoj ĉieaj; oni lin ekzekutis en 1944, ĵus antaŭ la militfino. En 1944 estis ekzekutita ankaŭ *György Kilián*, partopreninto de la SAT-kongreso en Leipzig, tre simpatia kaj altintelekta junulo, gvidanto de Junkomunista Movado; lian memoron gardas krom granda domo, iama kazerno, ankaŭ lernejo kaj strato.

Antaŭ nelonge oni metis memortabulon sur la bulvardan domon, kie iam vivis mia amiko, granda homamanto, fervora batalanto por la popolo, por sia patrio, por infanoj, por antialkoholismo kaj naturamikeco: *dro Rezső Rajczi*.

Antaŭ nelonge mi legis, ke unu el la novaj Budapeŝtaj stratoj ricevos la nomon de *Béla Vikár*, fama stenografo, eminenta kolektanto de hungaraj folklor-kantoj, membro de la Hungara kaj Finna Sciencaj Akademioj. Li tradukis en la hungaran lingvon la finnan popolepopeon Kalevala kaj la gruzan epopeon „La tigropelta kavaliro" de Rustaveli. Por ĉi lasta traduko li trovis gruzan esperantiston kiel helpanton, li do lernis Eon perfekte. Li estis honorprezidanto de la UK en 1929, komitatana membro de la Budapeŝta grupo kaj multe helpis la grupanojn en aranĝo de literaturaj vesperoj.

Jen do memorigiloj Budapeŝtaj pri Eo kaj esperantistoj. Ne malmultaj, sed ne seninde plimultigeblaj.

P. Balkányi

PRI LA FESTIVALAJ EKSKURSOJ



La aranĝanta stabo de la festivalo, okazonta dum 17—23 julio 1972 en Budapeŝto, metis en sian programon tri ekskursojn, kies celo estas montri diversajn regionojn de nia lando, kaj prezenti kelkajn vidindaĵojn el nia riĉa nacia kulturtrezorejo.

1. La unua ekskurso gvidos nin norde de Budapeŝto tra la montaro Pilis. La haltejoj de tiu ĉi vojaĝo estas: *Dobogókő—Esztergom—Visegrád—Szentendre. Dobogókő* estas la plej alta pinto (700 m.) en la montaro *Pilis.* De sur la supro vi vidas la majestan riveron Danubo kaj belegan panoramon. Historia etoso ĉirkaŭvebas vin en la urbo *Esztergom.* Preskaŭ 2000 jarojn pli frue ĉi tie situis romia kolonio „Solva Mansio". Sur la hodiaŭa Burgmonto la romianoj konstruis ŝtonfortikaĵeton, sed tiu detruiĝis dum la tempo de popolmigrado (4—9aj jarcentoj p. K.). Poste la patrujkonkeraj hungaroj okupis (896) la terenon, kaj la urbo, nome Esztergom, iĝis konstanta restadejo de la regnestra kortego. En tiu ĉi urbo naskiĝis la unua hungara reĝo, la ŝtatfonda Stefano Ia (poste kanonizita), kaj en tiu urbo li estis kronita en 1001. Je la fino de la 12a jarcento Adalberto IIIa konstruigis (1180) novan reĝan palacon sur la suda parto de Burgmonto, ĝiaj restaĵoj ĝis hodiaŭ estas videblaj. En 1241 tragika plago trafis la hungaran nacion. Tataraj hordoj el oriento invadis la landon, neniigante ĉion. Post ilia retiriĝo reĝo Adalberto IVa (1206—1270) translokis sian rezidejon al Buda, tamen Esztergom ne ĉesis resti la centro de la hungara katolika eklezia vivo. En la pasinta jarcento la sinsekvaj primasoj konstruigis sur la supro de la Burgmonto imponan katedralon, kiu estas nun la plej granda preĝejo en la lando. Ĝia stilo estas neoklasikisma, ĝia interno abundas je artvalorajoj. Apartan atenton meritas la kapelo nomata laŭ primaso Bakócz. Ĝi estas la plej bela hungarlanda renesanca memorajo el la jaro 1507.

La altarbildo en la sanktejo estas kopiajo pri bildo „Assunta" (Tiziano), ĝin pentris la itala M. Grigoletti el Venecio. Pro ĝia enorma dimensio (13x6,5 m.) ĝi estas en la tuta mondo unu el la plej grandaj pentrajoj pretigitaj sur tolo. Aparta ĉambrego gardas la plej riĉan eklezian trezorejon de la lando. Nur en centmilionoj da dolaroj oni povas taksi la valoron de la Kalvario nomata laŭ reĝo Matiaso. Tiu ĉi elstara ĉefverko de la Eŭropa juvelistarto estis pretigita el 7,5 kilogramoj da pura oro, ĝia alteco estas 72 centimetroj kaj sur ĝi troviĝas pli ol 200 veraj perloj. La nekredeble subtila prilaboro de tiu ĉi artobjekto laŭdas la mirindan artisman kreokapablon de la mezepokaj juvelistmajstroj. Alia vidindaĵo de la katedralo estas la subpreĝejo kun Egiptia karaktero. La kripto estas kopiaĵo de la orienta rokopreĝejo Karnak. La muroj ĉi tie estas 17 metrojn dikaj. Gasto de Esztergom ne preterlasu viziti la *Kristanan Muzeon,* troveblan en la ĉefepiskopa palaco. Unika signifo de la pinakoteko, ke ĝi donas sur mondnivelo koneksan sinoptikon pri la artistaj skoloj de la itala *Trecento* kaj *Quattrocento.* Alia artobjekto estas la tiel nomata *Kristo-ĉerko.* Ĝi estas hungara, gotika lignoskulptaĵo el 1500, kiu sur siaj kvar lignoradoj estis trenata de piaj kreduloj en la procesio de la sankta semajno.

Sed la tempo urĝas nin veturi al Visegrád. Ĝi situas sur la plej bela loko de la Danub-kurbiĝo. La citadelo sur la rokoplena pinto (328

Ĉu vi ŝatas HUNGARAn VIVOn? Rekomenedu ĝin ankaŭ al viaj amikoj!

m.) konstruiĝis por la edzino de reĝo Adalberto IVa en la mezo de la 13a jarcento, kiam oni ankoraŭ timis pro la eventuala ripetiĝo de la mongola invado. Same en la vilaĝo Visegrád trovis niaj arkeologoj la ruinojn de iama impona renesanca palaco de la granda humanista reĝo Matiaso (1440—1490).

La lasta haltejo antaŭ nia reveno estos la urbo Szentendre, ĉarma, pitoreska loko kun siaj multaj barokaj dometoj kaj preĝejoj. En la 18a jarcento serboj, kroatoj, grekoj, sudslavoj amase rifuĝis tien ĉi el la Balkano pro timo de turka atako. Jen kial vi trovas 7 ortodoksajn preĝejojn ĉi tie, inter ili eĉ ortodoksan episkopan katedralon. Cetere la beleco de la pejzaĝo inspiris multajn pentroartistojn. En la urbeto funkcias delonge artista kolonio. (Pri la urbo vidu H. V. 1965/3, 1966/4.)

2. La dua ekskurso *(Budapest—Székesfehérvár—Tihany—Szántód—Siófok—Budapest)* havas la ĉefan celon prezenti la lagon *Balatono* kaj ĝian ĉirkaŭaĵon. Dumvoje ni preteriros la malpli grandan lagon *Velence*, ŝatatan someran ripozejon de la budapeŝtanoj. Ni haltos en la urbo Székesfehérvár, pri kiu vi trovas apartan artikolon en la nuna numero. Simile detalajn informojn vi trovas pri la lago Balatono en H. V. 1961/1, 1962/2. Ĉi tie nur tiom: la lago estas 77 kilometrojn longa, meze 5 kilometrojn larĝa, ĝia bordo estas do la plej longa strandbanejo en Eŭropo. Norde la akvo rapide profundiĝas ĝis 4—5 metroj, la fundo estas ŝtonhava, male — la suda parto de la lago havas velurmolan sablan fundon kaj vi povas promeni en la akvo cent kaj cent metrojn internen pro la malalta akvonivelo. Ĉe la duoninsulo Tihany la lago estas la plej mallarĝa (1,5 km), sed la akvo la plej profunda (11 m.). Nepre vizitinda estas sur la monteto Tihany la kvaronjarmila baroka preĝejo kaj ĝia subpreĝejo, kiu lasta estas la plej malnova arkitektura memoraĵo en la lando (1055). En ĝi troviĝas la tombo ŝtono de la fondinto de la abatejo, reĝo Andreo Ia. La internon ornamas freskoj de eminentaj hungaraj pentroartistoj (K. Lotz kaj B. Székely). La mirindaj lignoskulptaĵoj estas 25-jara laboro de unu sola monaĥo Sebastiano Stuhlhof. Cetere Tihany kun siaj geologiaj, naturaj, historiaj kaj arkitekturaj vidindaĵoj estas en nia lando la unua proktektata regiono.

Pramo transportos nin tra la lago al la transa komunumo Szántód, de kie niaj aŭtobusoj jam proprarade atingos la urbon Siófok. Tie troviĝas la kanalo Sió, kiu kunligas la lagon kun Danubo. Vico de la modernaj hoteloj kaj ripozdomoj sur la 8 km a plaĝo ebligas senzorgan refreŝiĝon al la hungaraj laboruloj.

3. *Vizito al hungara vilaĝo* volas plenumi ties dezirojn, kiujn interesas la vivo de la kamparanoj. La agrikultura kooperativo vizitota estas proksime al la ĉefurbo, sekve la vojaĝo estas mallonga kaj pli da tempo restas por konatiĝi kun la provinca vivo. Programita estas ankaŭ rajdista spektaklo. Enkonduke nur tiom...

Kaj nun, karaj gastoj, estas via vico elekti inter la menciitaj programoj la plej konvenan al via koro kaj gusto.

Jozefo Mátéffy

Dum Via vojaĝo en Hungario certigas Vian komforton

EN STACIDOMOJ
restoracio, bufedo, nutraĵ-pavilono

EN TRAJNOJ
litvagono, restoracivagono, bufedvagono

EN ŜIPOJ
restoracio, bufedo

EN LONGDISTANCAJ AŬTOBUSOJ
bufedo

UTASELLÁTÓ

Favorpreze certigas la manĝigadon de turistaj grupoj la Pasaĝerproviza Entrepreno. Informojn donas kaj laŭdezire skribitan informon sendas la Pasaĝerproviza Entrepreno Budapest V., Veres Pálné u. 24 Tel.: 189-900/160

ALADÁR FARKAS

Li jam ne estas juna homo, naskiĝinta en 1909. Post la ellerno de la altlernejo li estis membro de hungara belarta vivo, membro de la Grupo de Socialistaj Belartistoj, li rolis en ekspozicioj kun atentindaj kreaĵoj, li studis kaj laboris dum jaroj en Parizo. Por siaj skulptaĵoj jam dufoje li ricevis Munkácsy-premion. Li kreis malgrand-skulpturajn seriojn pri la hispana civitana milito, la korea milito, tamen atingis veran famon enlande kaj eksterlande per sia Vjetnama serio, kreita en 1964, konsistanta el 37 pecoj. Interese, ke li vojaĝis al Vjetnamo nur post la kreo de sia Vjetnama serio, tamen liaj unusolaj figuroj aŭ plurpersonaj kompozicioj konfesas sugestive kaj konvinkforte pri la justeco de la popolo batalanta por sia libereco. Tiuj skulptaĵoj ne estas altaj, ne pli ol tridek-kvardek centimetraj, sed ilia efiko estas monumentala. Ekde 1964 oni povas renkonti ĉi tiujn artaĵojn kaj iliajn fotojn en diversaj gazetoj kaj libroj. Por la Vjetnama serio li ricevis altan ŝtatan honorigon, li fariĝis Merita Artisto de Hungara Popolrespubliko.

Li esperantistiĝis en sia dudeka jaro, li redaktis sola kaj kun aliaj esperantlingvajn ĵurnalojn, li estis kunlaboranto de Literatura Mondo. Ni opinias, ke la rolo de Aladár Farkas en la ekspozicio de Hungara Kulturfestivalo estos vera arta evento por ĉiu partoprenanto.

— gm —

GYULA SIPOS

SUB LAMPO

Tri viroj haltis stratangule
kaj primeditis:
Ĉu bone estus do eterne vivi?

L'unua diris, ke ne estus bone.
En ĉiu tag' la sama tramo venas,
kaj ĉiu jar' estas la sama jar',
ĝi kvazaŭ kopieblus per indigo.

La dua diris: Ĉu eterne? Kial?
June suferas ni pro troa forto,
maljune, ĉar la fortoj tro malmultas.

La tria, tiu nur silentis,
pensis pri tiuj, kiujn amas li,
pensis pri tiuj, kiuj amas lin,
deziris: ho, se vivus ni eterne!

LA PRAPASEO

Ĉu vi pri l' prapaseo nostalgias?
Kiel la reĝoj vivis, ĉu vi scias?
Vivis sen akvo pura, sen elektro,
la kapon gratis pro pedik' per sceptro.

Tr. *Márton Fejes*

ANNA PARDI

INTERRILATOJ

la homo estas certa pri l'vivo
certa pri l' morto
kiam li estas plej certa pri l'vivo
li ne pensas pri l'morto
kiam li estas plej certa pri l' morto
li pensas nur pri l' vivo.

TEZO

Inter la relativec-teorioj de la amo
ĉiam restas unu patrino, kiu naskas.

GYULA SÍPOS poeto, verkisto naskiĝis en 1921 en Transdanubia vilaĝo. La popola deveno, la unuaj travivaĵoj kaj spertoj, kaj la influo de t. n. popolaj verkistoj klarigas, ke lia evoluo jam komence promesis akcepton kaj jesadon de demokratia revolucio kaj de socia progresado.

Kiel studento li partoprenas en politikaj demonstracioj, poste en laborista movado. Post la liberiĝo lia politika kaj publicista agado okupis liajn energiojn kaj la du poemarojn de studento (1939, 1941) nur en 1954 sekvis la tria. Samjare li estis honorigita per beletra premio „József Attila". Ekde tiam li okupiĝas ĉefe pri literatura verkado. Intertempe aperis de li pluaj ses poemaroj. Verkis ankaŭ romanon; tradukadas el franca lingvo. Kiel poeto li egale uzas tradiciajn kaj modernajn formojn.

La tradukitajn poemojn ni elektis el lia poemaro „Erdőtűz" — (Arbarincendio; aperis en 1965).

ISTVÁN BARTA

Li estas 80-jara, naskiĝis en Hódmezővásárhely, urbo gravsignifa antaŭe kaj nuntempe en la hungara pentrarto. Inter la artistfamilioj estas konata ankaŭ la familio Barta. István Barta estas pentristo, lia pli juna fratino, Maria, estis poetvoĉa pentristo, lia frato, Lajos, vivanta eksterlande, sukcesa skulptisto. István Barta ricevis diplomon en 1912, poste li studis en Munkeno, Parizo, Vieno kaj Italio. Komence li laboris laŭ tradicia stilo, ankaŭ la Hungara Nacia Galerio gardas kelkajn belajn pentraĵojn de li. En la dua duono de sia kariero ankaŭ li eksperimentis pri eblaĵoj de arta abstrakteco, kubismo, tašismo. En la lasta jardeko li pentras kaj desegnas kun refreŝiĝinta emo, moderna stilo. En multaj siaj kreaĵoj li reproduktas la temon tute moderne, tamen ni sentas la solvon ebleca kaj simpatia.

En 1930 li renkontis Esperanton. Li lernis ĉe Ferenc Szilágyi. De tiu tempo li estis kunlaboranto de Literatura Mondo, kaj ilustris librojn de Kalocsay, Baghy kaj Szilágyi. — Li vivis en Danio de 1937 ĝis 1940 kiel pentristo kaj gvidanto de Esperantaj kursoj.

Niaj legantoj, kiuj havas malnovajn jarkolektojn de Hungara Vivo, povas legi pli multe en la numeroj 1965/4 kaj 1970/4.

— gm —

TAGLIBRA FRAGMENTO

Kuraĝe 'stas verki odojn
se oni havas sole unu vorton
uzeblan
kuraĝe 'stas amori kun iu
se la palpo havas sole
geografiajn gradojn
kaj ne havas profundon
kuraĝe 'stas travivi en absurdaj situacioj
ion cetere normalan.

AMO

Unu hom alia, tra kiu esprimiĝas mia neesprimebla vivo,

kun kiu mi povas tuŝi la ĉielon en terproksimo 168-centimetra,

kun kiu mi povas kovri miajn agresivajn instinktojn kontraŭ la mondo,

kun kiu post iu ajn stratangulo mi povas ekvidi la Pacifikan Oceanon,

kiu organizas la disfalan tempon per tio, ke li min elserĉas.

Tr. *K. Kalocsay*

AMROMPO

Ĝi pasis tiel, kiel kun salutkarto
la kristnaskaj festoj,
la etiko de la sentoj estas balono,
ĉu Himalajo aŭ pinglo ĝin trapikas: egale
ĝi krevas tuj, kaj sur tiu egale navigi
nenien ni povas

Sed la maro restas.

ANNA PARDI estas juna poetino, kiu eksperimentante serĉas sian propran voĉon, sed jam ĝis nun montris en siaj poemoj multon originalan, kelkon speciale sian. Ni citu de ŝi tie ĉi ankoraŭ kvar belajn versojn: „nur la juneco estas komenco kaj realiĝo, la cetero jam estas pli evoluinta sintezo, altgrada ripetado kaj lanta maturiĝo en la senliman morton".

(El la literaturaj programoj de Hungara Kulturfestivalo.)

Ferenc Karinthy

BÖSENDORFER

La unuaktaĵo *Bösendorfer,* verko de *Ferenc Karinthy* (filo de Frigyes Karinthy, konata pri sia esperantisteco kaj pri siaj Ee aperintaj verkoj: „Morgaŭ matene", „Vojaĝo en Faremido" kaj novelkolekto „Norda Vento") estas dupersona teatropeco; unu el la du eĉ partoprenas nur per sia telefona voĉo. Temas pri „telefon-bandito", kiel li sin nomas mem, kiu vokas telefone anoncinton pretekste de intenco aĉeti la anoncitan pianon kaj poste per vokoj sub diversaj nomoj kaj per diversaj voĉoj (simpla aĉetonto, polic-oficiro, bopatrino kaj ŝia nepo, pianagento kaj lia amatino ktp.) li sukcesas fari inferan implikaĵon. Fine li malkovras sin kaj tiam la triviala ludo turniĝas en seriozan, preskaŭ tragikan tonon. Ĉi lastan parton ni publikas nun. La unuaktaĵo, kiun sukcese oni ludis plurloke ankaŭ eksterlande, troviĝas sur la programo de la Hungara Kulturfestivalo.

Ŝi *(ekscitite):* Ha lo kiu parolas? Ritter-loĝejo?

Li: Kia loĝejo? Kiun vi serĉas, mi vin petas?

Ŝi: Ĉu cent-okdek-unu cent-dek-unu?

Li: Tiu parolas. Cent-okdek-unu cent-dek-unu.

Ŝi: Ĉu ne tie loĝas Margit Ritter?

Li: Mi vin petas, ĉi tiu estas la loĝejo de sinjoro aktorartisto Ferenczi.

Ŝi: Mi ne komprenas. Ĵus ŝi min vokis kaj indikis al mi ĉi tiun numeron.

Li: Mi ripetas, ĉi tiu estas la loĝejo de sinjoro aktorartisto Ferenczi. Cent-okdek-unu cent-dek-unu.

Ŝi: Kiu estas ĉe la telefono?

Li: Ĉi tie parolas la lakeo. La sinjoron artiston momente mi ne povas doni, ĉar ĵus li iris sin razi. Kion mi povas al li anonci, kiu lin serĉis?

Ŝi: Sed, mi vin petas, min ĵus sinjorino, kaj ĝuste de ĉi tiu numero, tiel ŝi diris... Cent-okdek-unu cent-dek unu?

Li: Tiu parolas.

Ŝi: Do, ĉi tio estas mistera, nekomprenebla. Mi nome, anoncis pianon por vendo, kaj je tio sin prezentis tiu sinjorino, pli ĝuste... Eble ia stulta malbona ŝerco, moka blago. Tamen, ŝi estis tiel malespera, ŝi petegis, ke mi ŝin revoku.

Li: Kaj ĉu ŝi indikis ĉi tiun numeron?

Ŝi: Ne povas esti eraro. Skribe mi notis ĝin.

Li: Tiel do? Nu, tiam estas en ordo. Tiam estis li, la sinjoro artisto.

Ŝi: Kiel do la sinjoro artisto?

Li: Tiel li kutimas sin ekzerci, tio estas, li nomas tion etudado. Ĝi estas ia speco de trejnado por li, restimulado antaŭ la prezentado.

Ŝi: Ej, kiel do? Al mi telefonis virina voĉo.

Li: Ho, mi vin petas, por la sinjoro artisto estas tute egale: virina voĉo, maljunulino, infaneto, ĉiun el ili li imitas perfekte, lia registro estas tre larĝa. Li vokadas tiun aŭ ĉi tiun kaj improvizas tiajn situaciajn ekzercetojn, laŭ tio, kio ĝuste venas al li en la kapon.

Ŝi: Sed li indikis ja ankaŭ sian numeron.

Li: Jes, ĉe siaj pli sukcesaj rolo-kreoj li kelkfoje ĝin indikas, por povi ĝin daŭrigi alifoje. Tre nuancriĉe, tre realece li konstruas siajn figurojn. Hodiaŭ li telefonadis en ia afero de piano.

Ŝi *(iritite):* Mi vin petas, venigu al mi ĉi tien la sinjoron artiston.

Li: Mi bedaŭras, nun li ne povas veni. Li faras al si tualeton kaj baldaŭ li devas iri al la teatro.

Ŝi: Tiam do diru al via mastro... *(Kun larmoj)* mi estas aĝa, kormalsana virino, li serĉu por si iun alian por amuziĝi... Ne estas ja eble, ne licas fari tiaĵon al sendefenda, senpova... *(Sia voĉo eksingultas.)*

Li: Ha lo! Ha lo! Mi vin petas... Ŝi ĝin demetis. *(Li teruriĝas, forgesas demeti la aŭdilon. Malcerte.)* Ha lo... Nu! ĉu eble ŝin ne trafis io fatala? Hu, je la rondo de l'mondo!... *(Li metas cigaredon en la buŝon, sed lia mano tiel tremas, ke li ne kapablas ĝin ekbruligi. Poste rapide, ekscitite li diskas denove.)* Kial oni ĝin ne levas? Bonvolu jam fine ĝin levi!... ĉu eble mi diskis eraran numeron... *(Li rigardas la ĵurnalon.)* Cent-kvardek-ses kvin-okdek... *(Li malŝaltas kaj ree diskas. Tamburas per la fingro sur la tableto, poste li metas tien ankaŭ la aŭdilon. Verŝas por si, trinkas, sed dume konstante rigardas la telefonon.)* Cetere ŝi povis ja eliri, en la kuirejon aŭ en la banĉambron... *(Malŝaltas, ree diskas.)* Kial ŝi faras ĉi tion, kial ŝi ĝin ne levas? Valvo difekta, tion ŝi diris? Diosinjoro, ŝi ja ne povas pro ĉi tiu kretenaĵo... Sinjorino Brodarics, kara bona Brodarics-edza, parolu jam, levu ĝin jam, mi scias, ke vi estas tie, mi scias, ke vi estas tie, mi scias, ke vi ĝin aŭdas... Bone, ankoraŭ tri sonoradoj, poste... Unu... du... tri... *(En sia kolero li ĵetas la tutan aparaton sur la teron. Poste, timiĝinte.)* Hu, se ĉi tio nun rompiĝis... *(Li levas la telefonon, ĝin provadas.)* Ĝi donas linion... *(Ree li diskas.)*

Ŝi: Ha lo!

Li: *(Malpeziĝinte.)* Nu, fine, fine, fine... Kial vi ne bonvolis ĝin levi?

Ŝi: Kiu parolas?

Li: Nenio malbona, ĉu ne?

Ŝi: Sed kiu do estas, kiu parolas?

Li: Parolas mi, ree parolas mi, ĉu, bonvole, vi min ne rekonas? Kun kiu vi parolis antaŭe, kaj pli antaŭe kaj pli antaŭe, ĉiuj tiuj estis mi.

Ŝi: Kiu do? Ĉu tiu aktoro?

Li: Ne, mi vin petas, mi ne estas aktoro, pli ĝuste nur ĉi-maniere, sur priseka bazo: unupersona en-

semblo, unupersona publiko. Sciu, bonvole, ke ĉi tio estas mia amuziĝo, mia pasio. Kio al aliaj estas la kino, la koncerto, futbalmatĉo, turfo, alkoholo, amo. Mi venas hejmen posttagmeze je la sesa kaj komencas telefonadi. Unu voko kostas unu forinton, mia Dio, ne tiom multekosta... Mi elpikas anonceton, kaj konfidas min al la momenta inspiro... Mi estis kapitano Baliko, mi estis Robeĉjo, mi la avino...

Ŝi: *(mire):* Ĉiuj tiuj estis vi? Ĉu ankaŭ Füzesabony?

Li: *(Ridas):* Tiu ne. Interurban linion ankaŭ mi ne havas. Sed la ceteraj estis mi: Gustavo Visincei, Margit Ritter, lakeo de sinjoro artisto Ferenczi...

Ŝi: Ĉi tio ne eniras al mi en la kapon, mi ne povas ĝin kredi.

Li: Tamen, ĝi ne estas tro malfacila afero: la tuto estas nur iom da voĉtekniko... *(Per diversaj voĉoj, ĉiun per la adekvata.)* Kamaradino, jen estas kapitano Baliko, forton kaj sanon... Avinjo, mi volas marmeladan panon!... Restu silenta, Robeĉjo!... Estas mi, mankisojn. Wisintzey, kun germana vo, to-zo kaj kun du punktoj sur la ipsilono... Ne, mi vin petas, ne Wisintzey, antaŭe li estis nomata Vacek, kaj ankaŭ cetere li ne aĉetas pianon... Parolas la lakeo, sinjoro artisto Ferenczi havas tre larĝan registron... *(ridas)* Nu ĉu vi vidas, bonvole?

Ŝi: *(Indigne):* Do sciu, ĉi tio tamen estas ja impertinentaĵo! Mi proteste rifuzas vian ludaĉon, kiel do licas min miksi en tiajn aferojn?

Li: Ha lo! Ha lo!... Kio do? Ĉu ree ŝi demetis ĝin? *(Li demetas la aŭdilon.)* Nu, ne, ne, ne, ne. Malbone. Tiamaniere estas malbone, de misa stilo, tiel tamen oni ne povas ĝin fini. Tian serion, tiel bele ellaboritan... *(Li ekfumas, verŝas por si, trinkas. Cerbumante.)* Ia nova koloro necesus, kvalita salto. Psikologia fin-klako, dramaturgia enprofundigo, muzika finalo... Nu, kaj kio estus, se... Ho, ho, momenton. Nu, bonvolu al mi atenti, kara Brodarics-edza. Via moŝto nun koleras min, tio estas komprenebla, pridemandos mian nomon ĉe la informejo, eble metos plendon, volas skribi leteron al iu redakcio. Nu, per kio ni vetu, kara Brodarics-edza, ke vi ankoraŭ ludos al mi pianon hodiaŭ, kara Brodarics-edza! *(Ree li trinkas, fajfetas.)* Avanti popolo!... *(Li diskas.)*

Ŝi *(malkonfide):* Ha lo!

Li: Mi aŭdas en via voĉo la suspektemon, sinjorino. Ne timu, mi ĵuras, ke nun mi vokas vin lastfoje. Ankaŭ nun por tio, ke mi petu pri via pardono.

Ŝi: Vidu, ĉi tio jam estas pli ol multa. Lasu min trankvila!

Li: Mi scias, ke vi koleriĝis kontraŭ mi, eble eĉ malamas min. Vi estas prava. Mi trapensis la tutan aferon kaj estus malfacile trovi por mi ekskuzon. Pardonu min. Pardonon, mil kaj unu milionojn da pardonoj.

Ŝi: Diru, kiel longe vi volas min ankoraŭ turmenti?

Li: Mi rekonas, ĝi estis malbona ludo, stulta, malica ŝerco. Mi estas ulo sordida, telefon-bandito, telefonhieno... Kaj nur pri tio mi vin petas, adiaŭante, kaj por ke iomete ankaŭ min vi komprenu: imagu vin en mian lokon por momento! Mi scias, ke mi havas la plej malgrandan rajton peti komprenemon, kaj tamen, tiel mi turnas al vi sinjorino, mi, la senkredulo, kiel al kredulino, kiu ankaŭ al siaj ŝuldantoj...

Ŝi: Mi vin petas, ĉi tio eble tamen ne...

Li: Certe ankaŭ vi memoras tiun almozulon, kiu sidis en la bulvardo, nana, rampanta kriplulo, kun tabuleto sur la kolo: „Imagu vin en mian lokon..."

Ŝi: Kial? Ĉu vi estas malsana?

Li: Ne, ne; ne tiel mi komprenis almenaŭ korpe ne... Sed bonvolu pripensi, mi hejmenvenas el la biblioteko — ĉar nuntempe mi laboras en biblioteko, tio cetere ne estas signifa, estas ligno-hakado, kulia laboro, ĉiutage de la oka kaj duono ĝis la deksepa —, mi venas hejmen ĉi tien, en la ĉiam, ĉiam malplenan loĝejon, ni diru, je la sesa posttagmeze. Tiam, ĝis la sekvanta mateno: dekkvar horoj. Semajne naŭdek ok horoj, se ne kalkuli la dimanĉon, monate kvarcent horoj, jare...

Ŝi: Kaj ĉu vi ne hontas pasigi vian tempon per tiaj azenaĵoj? Ĉu vi ne havas familion, ĉu vi havas neneniun?

Li: En mia persona legitimilo estas skribite: eksedziĝinta. Tion, ĉu ne, tamen oni ne povas enskribi, ke: forlasita... Nu jes, antaŭe mi mem pensis, ke la soleco estas eksterordinara stato, tia kiel la tuberkulozo, el kiu oni povas ankaŭ resaniĝi. Poste, iom post iom, mi konsciiĝis, ke ĝi estas la natura vivoformo, la cetero estas nur memtrompo, memmistifiko. La plej granda komunumo, la plej larĝa, plej vasta sur la terglobo, estas la tri miliardoj da solecoj. Ĉu vi ne pensis pri tio: ju pli multe da homoj ekzistas en la mondo, des malpli ili komprenas sin reciproke? Tri miliardoj da kosmonaŭtoj, ĉiu sola, manovranta sen direktado en la spaco. Ĉi tio estas ia speciala, reciproka rilato, matematike oni povas ĝin esprimi tiel, ke... Sed mi timas, mi vin tedas per ĉi tiuj filozofiaj idiotaĵoj.

Ŝi: Ankaŭ mi vivas sola, tamen mi ne parolas tiel. Ĉar ne ekzistas unu sola horo, unu sola minuto, kiam mi ne sentus, ke la bona Dio estas kun mi... Kvankam vi ankoraŭ ne estas aĝa, ĉu ne?

Li: Ĝuste la plej malbona aĝo. Kvardek. Poste eble estos plibone.

Ŝi: Juna homo. Vi povos ankaŭ reedziĝi.

Li: Sciu, mi timas, ke mi estas de infekta konstitucio... Laŭ mi, ankaŭ mia edzino estis prava, ke ŝi foriris de mi. Kaj tamen, dum jaroj mi ŝin reatendadis, mi elcerbumis komplikitajn planojn, en cent specoj de variantoj, kiel mi povus ŝin revenigi. Mi ne kapablis tion transpasi, mi kuŝis ĉi tie, de nokto al nokto, kun ĉi tiu kancere superkreskanta fiksa ideo, sennombrajn fojojn remaĉante la tuton cirkle-cirkle tien kaj reen, en ĉiam tiu sama sencela, vana, freneza kapturniro. Ŝi reedziniĝis ja de tiam, naskiĝis al ŝi du filinetoj; mi neniam havis infanon... Tiam mi decidis, ke mi foroperacios ŝin el mi, senindulge, radike. Estis malfacile: ĝi nestis pli profunde ol mi pensis tiam, ĝi estis kreskinta en la oston, karnon, en nervojn, disbranĉiĝinte laŭ longo kaj larĝo, kun metastazoj: lanta, turmenta, longa-longa estis la serio da operacioj, per kiuj mi sukcesis elkapsuligi ties ĉiujn pli-longaĵojn... Hodiaŭ ĝi jam ne doloras. Sed jen kio estas stranga: kune kun ĝi mi ŝajne eltranĉis ian sentan aŭ sentimentan centron, aŭ kiel ĝin nomi, se ekzistas io tia. Ĉar de tiam mi havas ĉi tiun patologian senpezecon, ke min efikas nenia homa altiro, gravito. Kelkfoje mi kunvenigas kun mi virinon, por mono aŭ senpage, estas ja

egale, biologia afero... Mi scias, ke ne tro interesa estas la tuto; kiaĵojn mi eltrovadas, jene dum telefonado, tiuj estas pli ekscitaj ol la mia, ĝuste tial mi eltrovas ja ilin.

Ŝi: Do, mi komprenas, ankaŭ al vi ne estas facile. Sed vidu, mi estas kormalsana, nun mi lasu jam la aferon, ni ĝin finu!

Li: Mi vin petas, ne demetu ĝin, mi vin tre petas. Tiel bone estas kun vi paroli. Vi estas tiel afabla, delikata, komprenema.

Ŝi: Tio ne havas sencon. Voku iun alian, kiu havas emon kun vi babili.

Li: Sed mi dezirus kun vi. Ne demetu, ĝin, mi ĉiel vin revokos ja.

Ŝi: Mi eltiros la ŝnurkonektilon.

Li: Tiam permesu, ke ankaŭ alifoje mi povu alsonorigi. Ne miskomprenu min, kompreneble per mia propra voĉo... Aŭ ĉu vi scias, kio al mi venis en la kapon? Ne prenu tion per altrudiĝo, tiel bone estus vin viziti foje. Mi povas tiel bone imagi vian loĝejon: tiuj multaj puntoj, kusenoj, malnovaj mebloj, vitrino, kun porcelanaj statuetoj, kun memorglaso el Karlovy Vari, granda plurtirkesta komodo, familiaj fotografaĵoj sur la muro... Tie pendas ankaŭ via geedziĝa foto, ĉu ne? Poste la piano kovrita per franĝa kovrilo, sur ĝi kapo de Beethoven — aŭ de Wagner? Schubert? —, apude la muziknota pupitro... Ni trinkus teon, certe vi havas belan servicon Alt-Wien, kun flavaj kaj bluaj floroj, mi alportos kukaĵojn, ni konversacios pri Stravinskij, Bartók, krome mi rakontus la vi, kio nova en la urbo, kiaj ŝipoj veturas sur Danubo, kion multon oni povas vidi en la montrofenestroj, kaj tiel plu. Mi dirus al vi la novajn humuraĵojn, teatrajn klaĉojn, ni vetu, ke mi vin ridigos! Kredu min, ankaŭ vi havus ree iun, kiun vi jam eĉ atendas, al kiu vi povus montri viajn manlaboraĵojn, pri kiu vi pensadus, kaj se li foje restus for, eble vi iomete eĉ sentus pri li timon... Lasu, ke mi vin vizitu foje-foje, ĉu ne, vi permesos tion, ne malpermesos tion? Ne forprenu de mi ĉi tion, vi ne povas tion fari, la lastan pecon de tabulo disde dronanto... Kaj ree vi ludos al mi pianon, ne vendu tiun Bösendorfer, al mi vi ludos pianon! Jes, jes ĉu ne, vi ne koleras jam, mi sentas, mi scias, ke vi min pardonis, komprenis, absolvis... Ne, ne, eĉ ne respondu, ion alian mi petas de vi, ne surpriziĝu: ĉu vi ne volus ludi pianon ankoraŭ iomete? Jes, jes, nun tuj, tie la piano estas ja en la proksimo, nur tiom, kiom antaŭe, la Für Elise... Aŭ eble iom da Mozart, la Sonata facile, tiun certe vi konas, scias... *(Li fajfas la melodion).* Terure falstona mi estas, ĉu ne? Ĉu bonvole, vi min aŭdas? Jene ĝi iras... *(Li ĝin fajfas).* Ha lo!... Ha lo!... Ha lo, ĉu vi ne aŭdas, bonvole?... Ha lo! *(Li rigardas la aŭdilon.)* Ŝi demetis la aŭdilon... De kiam do mi jam parolas jene en la aeron?... *(Rapide li diskas denove. Oni aŭdas, ke tie transe le telefono elsonoras.)* Kial oni ĝin ne prenas?... Ŝi eltiris la ŝnurkonektilon... *(Li ankoraŭ ĝisatendas ses aŭ ok sonoradojn, poste li malŝaltas.)* Domaĝe... Ĉi lasta rolo-kreo estis ja sufiĉe travivata... *(Li korpkliniĝe velkas, kelkajn momentojn restas tute senmova. Poste malrapide li ekbruligas cigaredon, disblovas la fumon. Verŝas por si, trinkas, stariĝas, elrigardas tra la fenestro.)* Pluvo, pluvo, sordida vetero... *(Li oscedas, dispremas la cigaredon, prenas la ĵurnalon, priserĉadas inter la anoncetoj, kaj ĉe unu el ili li haltas. Li diskas.)* Ha lo, ĉu vi entreprenus ekstermon de ratoj per dresita putoro?...

(Kurteno)

Tradukis *K. Kalocsay*

HUMURO

— Ne eble elteni la vivon kun mia edzo! — plendas virino. — Li dibo-ĉadas, ne donas hejmen sian salajron, min trompas. Jam dek kilogramojn mi malgrasiĝis de mia ĉagreno.

— Vi, kompatinda. Kial vi ne forlasas tiun friponon?

— Nu, sciu, ke mi volas ankoraŭ plimalgrasiĝi du kilogramojn.

La aĝan fraŭlinon Bella ĝenas la najbaroj, demandante, kial ŝi ne edziniĝis.

— Por kio? — ŝi respondas. — Mi havas ja hundon, papagon kaj katon.

— Sed tiuj ne anstataŭas edzon!

— Kiel do ne? Mia hundo ĉiam murmuras, mia papago blasfemas la tutan tagon, kaj mia kato pasigas ĉiun nokton ekster la hejmo.

Virino lamentas:

Mi havas tiom da zorgoj kaj ĉagrenoj, ke en la lastaj kvin jaroj mi maljuniĝis minimume du jarojn.

Mezaĝa virino, patrino de tri infanoj, vizitas infankuraciston kaj demandas:

— Kiel mi povas sciiĝi, ĉu miaj filoj jam adoleskas?

— Tre simple — respondas la kuracisto. — La bebo fariĝas infano tiam, kiam li volas sciiĝi, de kie li venis. Kaj la infano fariĝas adoleskanto tiam, kiam li ne emas diri al la gepatroj, kien li iras.

Junulo plendas al kuracisto:

— Tre malfacile estas al mi endormiĝi, sinjoro doktoro.

— Provu kalkuli ĝis dek kaj poste ĉiam denove ĝis dek.

— Tio ne helpas. Mi ĉiam saltleviĝas, kiam mi atingas ĝis ok.

— Sed kial do?

— Mi estas boksisto.

En la tramo junulino siblas al junulo:

— Ne kverelu! Oni pensos, ke ni estas geedzoj.

SPORTÁRU KTSZ BUDAPEST

Sportrondoj, Sportfakoj, Atenton!

Ni sciigas la sportrondojn, ke la nova adreso de nia kooperativo estas

Sportáru KTSZ (Sportvaroj, Kooperativo)

Budapeŝto, XIV. Várna u. 5—7
Telefonoj: 631-459, 832-458

Ni fabrikas diversajn sport-ŝuojn (por futbalo, trejnado, kurado, luktado, halterlevado ktp.), krome akceptas ties ĝeneralan riparadon.

Ni pretigas: sportvestaĵon, kampadtendon, aŭtokovraĵon kaj aliajn veltolaĵojn, krome ĉasistajn ekipaĵojn (kartoĉzono, pafilujo, ĉasista saketo, ktp.).



NI ESPERAS, KE VI ESTOS KONTENTA, SE VI MENDOS VIAĴN SPORTILOĴN ĈE NIA KOOPERATIVO.

Ne forgesu nian supran novan adreson

panoramo

En Eŭropo la esploristoj de la Medikamentfabriko CHINOIN produktis la unuaj el la *prostaglandin* kvanton sufiĉan por klinikaj esploroj. Ĉi tiu hormonefika substanco estas unu el la plej gravaj inventoj de la jarcento; ĝi formiĝas en la homa organismo kaj plenumas multajn funkciojn de regulado. Laŭ la ĝisnunaj malkovroj, ĝi havas esperplenan estontecon unuavice en la regulado de naskiĝo. Krome, ĝi influas ankaŭ la sekreciadon de la stomak-acido, kaj supozeble oni povas ĝin utiligi ankaŭ por kuraci astmon. Laŭ la fakaj opinioj la prostaglandin post 5—6 jaroj fariĝos komune uzebla medikamento. Provizore, pro la eksterordinara komplikiteco de ĝia produktado, ĝia valoro estas milobla kiel tiu de la oro.

* * *

Komence de ĉi tiu jaro Nederlanda Teknika Semajno *estis aranĝita dufoje en Budapeŝto. En la lastaj jaroj ĝojinde pliboniĝis la hungaraj-nederlandaj komerc-rilatoj. La hungara eksporto al Nederlando kreskis de la 1967-jaraj 140 milionoj da devizoforintoj en 1970 al 420 milionoj, kaj la importo al Nederlando el Hungario kreskis de 123 milionoj al 420 milionoj. Kaj la importo-eksporto inter la du landoj kreskis plue en 1971.*

* * *

Da *eksterlande vivantaj hungaroj* preskaŭ 140 miloj vizitis Hungarion en 1971, pli ol iam ajn antaŭe. Plej nombre ili alvenis el Eŭropaj landoj: el FR-Germanio, el Aŭstrio, el Svedio, krome el Usono kaj Kanado, sed pli malpli grandaj grupoj venis ankaŭ el Aŭstralio kaj Sud-Afriko. La refreŝigon kaj renovigon de iliaj interrilatoj kun la naskolando dezirigas al ili ankaŭ ties pli kaj pli vasta rekono, ke por konservi sian hungarecon ili nepre bezonas koni kaj fidele flegi la lingvon kaj kulturon de la naskolando.

* * *

La hungara literaturo havas grandan popularecon en Pollando. De post la liberiĝo preskaŭ 145 verkoj de 100 hungaraj verkistoj aperis pollingve kaj el ĉi tiuj 125 aperis en la lastaj tri jaroj.

* * *

En aŭgusto oni aranĝos en *Budapeŝto* la unuan *mondkonkurson de vino*, kie oni esperas partoprenon de 40—45 landoj kaj atendas pli ol mil vin-specialaĵojn. Oni aplikas taksosistemon tre malsaman de la ĝistiamaj.

En la „Kunst-Museum" (Artmuzeo) de *Winterthur* (Svisio) estis aranĝita ekspozicio: *Hungara Naiva Arto en la XX-a jarcento.* En la ekspozicio oni prezentis pli ol okdek kreaĵojn de dek kvar pentrartistoj.

* * *

La internacia librokomerca entrepreno „Kulturo" *venigas la hungarajn librojn, produktaĵojn de 18 libroeldonejoj, al preskaŭ 90 landoj de la mondo. El la libroeldonejoj atingis signifan rangon „Akademia" per siaj diverslingvaj sciencaj faklibroj, kaj „Corvina" per siaj fremdlingvaj beletraj, belartaj ktp. libroj; ĉi lasta eldonis ankaŭ E-e la Tragedion de Madách kaj poemaron de Petőfi. La „Kulturo" eksportas hungarajn revuojn, gramofon-diskojn, belartajn kaj artindustriajn kreaĵojn, kaj vidige instruajn instrumentojn por lernejoj.*

La entrepreno „Kulturo" partoprenos en 1972 la libroekspoziciojn en Kairo, Bruselo, Frankfurt, Warszawa, Beograd, Sofio, Madrid, Sao Paolo, la prezentadon de la Usonaj bibliotekistoj, la printempan kaj aŭtunan internacian foiron en Leipzig.

* * *

Henrik Ripszom, *brita skulptartisto hungardevena estigis grandsuman stipendio-fondumon disponige al la hungara ŝtato. Helpe de la stipendio pluraj profesoroj kaj finintaj studentoj de la Budapeŝta Metiarta Ĉeflernejo povos studi la anglan belarton.*

* * *

En la centra arta galerio de *Tokio* oni aranĝis *kolektan ekspozicion* el la kreaĵoj de 38 nunaj hungaraj grafikistoj en februaro. La materialo, ĉirkaŭ 100 bildoj, estis prezentita post Tokio ankaŭ en pluraj grandaj urboj de Japanio.

* * *

En Parizo *oni aranĝis en februaro* Hungaran Kulturan Semajnon; *tie la publiko povis ekkoni niajn plurajn filmojn kaj artistojn. Pluraj gazetoj menciis, ke la okazaĵo hazarde koincidis kun la Pariza gastrolo de* Jenő Ormándy, *la hungara muzikestro de la Filharmoniistoj en New-York, kaj ke ankaŭ la eksterlande vivanta* Györ Solti *ĵus transprenis la gvidadon de la Parizaj Filharmoniistoj.* Solti, *en tiu ĉi sia funkcio „omaĝe al sia naskolando" — kiel* Le Figaro *skribis — debutis per la prezentado de la opero de* Bartók: *„La burgo de la blubarba princo" kaj rikoltis grandan sukceson.*

* * *

Por funkciigo de konstanta *hungara restoracio* kontraktis la *Hungarhotels* kaj la Okcident-Berlina hotelo *Ambassador.* Kiel la unuan hungaran restoracion de la urbo oni malfermis la *„Pálinka-ĉardon"* en marto, angule de la *Kurfürstendamm.*

panoramo

La Mondfederacio de hungaroj *establis teorian laborkolektivon el historiistoj kaj sociologoj, kiu, laŭ la ĉefsekretario* József Kárpáti, *disvolvos multflankan aktivecon. Ĝia unua tasko estas ekz-e prilabori la historion de la elmigrado. Alia celo estas mezuri la situacion de la generacioj vivantaj eksterlande, kaj esplori iliajn demografiajn kaj sociologiajn cirkonstancojn.*

* * *

Hungario ĉi-jare festos la 150-an naskiĝtagon de sia plej granda poeto: Aleksandro Petőfi. *Ĝoje ni povas ĉiokaze sciigi pri la kreskanta rekono de lia poezio. En Sovetunio aperis, komence de la jaro, 600-paĝa eldono de liaj poemoj, tre bele farita, en 300 mil ekzempleroj. Liaj verkoj, ekde 1946, se ne kalkuli la nuntempan eldonon, atingis en Sovetunio unu milionon da ekzempleroj.*

* * *

La angla teatra revuo „Stage" analizis en detala artikolo la teatraĵon „Bösendorfer" de *Ferenc Karinthy.* Ĝi estis prezentita en la teatro *Recreation Ground* en Londono. La *arta kaj eduka mondligo* INSEA tenis sian lastan kunsidon en Hispanio. Tie Eŭropa, Afrika kaj Proskim-Orienta konsilioj alvokis Hungarion por la gvidado de la informservo kaj por la redaktado de bulteno periode aparanta, okupiĝanta pri la problemo de la arta edukado.

* * *

La reĝa balet-lernejo en Hago triafoje invitis Ágnes Roboz, *profesorinon de la Stata Balet-instituto, instrui orienteŭropan kaj hungaran folkloron.*

* * *

En Rumanio, en la lernojaro 1971—72-a funkcias entute 2384 hungarlingvaj lernejoj kaj sekcioj. El tiuj 1337 estas ĝeneralaj lernejoj, 86 gimnazioj, 5 pedagogaj altlernejoj, 955 infan-vartejoj.

Kore ni atendas la esperantistojn en niaj turistodomoj sur tuta teritorio de la lando. Okaze de viaj ekskursoj vizitu nin.

Ĉambrorezervigo: Budapeŝto, VI., Lenin krt. 55. Telefono: 224-230.



Pécs

Urbo ĉe la piedoj de montaro Mecsek

Ŝajnis al mi facila tasko skribi pri la urbo, kie mi plenkreskis, kie la labor- kaj festtagojn dum 16 jaroj mi travivis. Nur dum skribo evidentiĝis: ĉi tiu proksimeco malhelpas la laboron — mia amo al la urbo, simile al la gepatra amo, influas min.

Sed: kiel estu neinfluita la naskitino de la urbo — ja la antaŭ-6000-jara homo estis jam „influita": li trovis taŭga la lokon kaj elektis el la tiama senlima kampo por ekloĝo la teritorion de nuntempa Pécs, la sudan deklivon de la montaro Mecsek. De tiam kontinue estas loksidiĝo sur tiu teritorio.

Sekve, la emo, kiu ŝajnas esti neobjektiva, ĝustadire estas rekono al la loko, kie ĉiam fartis bone la homo: de la ŝton-ĝis la atom-epoko.

La elektitan lokon la romianoj formis grava loko. La antikva urbo, *Sopianae* (fondita antaŭ 2000 jaroj) iĝis provincrezidejo, tra kiu kondukis unu el la plej gravaj vojoj de la imperio. Dum la duonjarmilo de la popolmigrado ankaŭ ĉi tie interŝanĝis lokon la diversaj popoloj, kaj finfine la urbo estis okupita de la hungaroj en 899.

Cent jarojn post la patrujokupo Stefano la Unua fondis episkopejon en la urbo. Ĉi tiu fakto akcelis, ke la urbo baldaŭ fariĝu kulturcentro de eklezia karaktero. En 1367 Pécs jam havis universitaton kun rajto de „studium generale". Ankaŭ la industriiĝo komenciĝis en la 14-a jarcento — sed la turka konkero haltigis la disvolviĝon. La konkerantoj intencis doni turkan karakteron al la urbo — dum la 143-jara okupado (1543—1686) krom la loĝdomoj kaj banejoj ili konstruis 6 klostrojn, 7 ĉefpreĝejojn (ĝamiojn), 10 moskeojn kaj 16 lernejojn. (Estas interesa paradokso, ke la konstruaĵoj, kiuj postrestis el la tragikaj turkaj jaroj, nuntempe estas fierindaĵoj de la urbo...)

Post la ĉeso de la turka okupado, longtempe ne povis reiri la vivo en normalajn kadrojn, sed en la 18-a jarcento Pécs denove estis loko de vigla kultura kaj ekonomia vivo — precipe ekde 1780, kiam ĝi iĝis „libera reĝa urbo".

La bazon por la kapitalisma evoluado donis la karbo de montaro Mecsek. La liverado de la karbo bezonis trafikan eblecon, kaj la trafiko helpis estigadon de novaj fabrikoj. En la dua duono de la 1800-aj jaroj unu post alia estis fonditaj porcelan-, ĉampan-, gant-, orgen-, led- kaj tabakfabrikoj.

Inter la du mondmilitoj — kompreneble en la kadro de kapitalismo — Pécs iĝis industrie kaj kulture matura urbo. Al la universitato apartenas medicina, jura, filozofia kaj Luterana teologia fakultatoj.

La bataloj de la dua mondmilito indulgis la urbon — tial post la liberiĝo ne la rekonstruo okupis la urbanojn, sed la evoluigo.

La mino, la fabrikoj kaj la instruaj institucioj estis alŝtatigitaj. En 1954 la esploristoj konstatis, ke en interno de la montaro krom la karbo estas trovebla ankaŭ urano. La malfermo de la nova mino, donante novajn labor-eblojn, pligrandigis la nombron de la loĝantoj. Baldaŭ sur loko de la malnova aviadilkampo konstruiĝis nova loĝkvartalo, kiun la urbanoj nomas Uran-urbo. Ĉi tiu urboparto estas majstra verko de la moderna hungara arkitekturo kaj urbregulado. La aliaj kvartaloj de Pécs ankaŭ evoluas: leviĝas novaj domoj oriente apud la nova energiocentralo, sude en la ĝardenurbo kaj nordokcidente, kie nuntempe elformiĝas nova universitata centro. Unue la medicina universitato recevis palacon : la 8-etaĝa konstruaĵo enhavas 400-litan klinikon kaj instruejojn.

Do, praa kaj tamen juna urbo estas Pécs. Promenante sur ĝiaj stratoj ni povas vidi harmonian interkrociĝon de la paseo kaj nuntempo.

La pasaĝero, kiu renkontas la urbon unue ĉe la fervojstacio, surpriziĝas vidante la eksterordinare belegan panoramon: la urbo prezentas sin kiel sur paĝo de malfermita bildolibro. La deklivojn de la montaro Mecsek kovras mallarĝaj stratoj kaj meze distingiĝas la fama kvartura katedralo.

En la stratoj de la interna urbo preskaŭ sur ĉiu domo estas videbla tabuleto: „historia monumento". Jes, ĉiu kiu vivis en tiu ĉi loko, donacis ion al la postepoko. La urbestraro zorgeme gardas la fierindaĵojn de la urbo: la 1600-jarajn katakombojn, la 1000-jaran katedralon, la restaĵojn de la mezepoka fortikaĵmuro, la ruinojn de la renesanca episkopa palaco sur la altplataĵo Tettye, la turkajn preĝejojn, la minareton kaj la interesajn burĝajn loĝdomojn el pacaj epokoj... Mi povus daŭrigi la denombradon, sed longa vico de studoj ne estus sufiĉa por pritrakti la belaĵojn de Pécs. Nu, kaj vere: nura raporto sen spektado malmulte valoras...

Estas organika parto de kultura vivo de Pécs la vigla esperantista vivo. Ĉi tie laboras la 3-a Teritoria Komitato de HEA, kiu en la kuranta jaro jam la kvinan fojon organizas la *Internacian Renkontiĝon de Esperantistoj Naturamikoj* (IREN) inter la 24-a de julio kaj 2-a de aŭgusto, proksime al Pécs, en Abaliget. Abaliget, la belega vilaĝeto situas 20 km-ojn de Pécs sur la deklivoj de montaro Mecsek. La programo de IREN enhavas ankaŭ tuttagan ekskurson al Pécs. Kaj ne nur Pécs kaj Abaliget abundas je artaj kaj historiaj monumentoj kaj naturaj belaĵoj, sed la tuta departemento Baranya, — kiu estas — mi povas diri tion sen partiemo — unu el la plej belaj partoj de Hungario.

Éva Tófalvi

ATENDAS VIN

MINI

DOMUS



Garnituroj, kompletoj tapetitaj, unu- kaj dupersonaj sofoj, plurkoloraj kaj plurformaj, estas riceveblaj en granda sortimento!

MINI

DOMUS

Budapeŝto V., Kecskeméti u. 11.

Malfermita: de 10-a ĝis 18-a horo, sabate inter 10-15-a horoj.

Liver-servo Vendado laŭ modeloj OTP-Servoj de Landa Ŝparkaso

ISTVÁN PÁL NOLIPA

Li naskiĝis en 1907, en suburbo de Budapeŝto. Ankaŭ nuntempe li vivas en Pesterzsébet, kaj tie pentradas kun juneca emo, simpatiajn kolormondajn pentraĵojn, desegnas skizojn pri la iama malriĉa kvartalo kaj ĝiaj loĝantoj.

Ci tiu regiono kaj la profesio de lia patro (kolorigisto) determinis la mondkoncepton kaj poste ankaŭ lian arton poezian. Inter la du mondmilitoj li estis membro de plej revoluciema branĉo de tiama belarto, ekde 1940 li estis prezidanto de la Grupo de Socialistaj Belartistoj. Post 1945 dum dek jaroj li direktoris Belartan Gimnazion. Nolipa estas pasia vojaĝanto, traveturis multajn landojn de Eŭropo. Konfesas fidele pri tiuj travivaĵoj la multnombraj pentraĵoj kaj grafikaĵoj. Gis nun li prezentis siajn kreaĵojn al enlanda publiko naŭfoje individue, kaj deksepfoje komune. Liaj folioj rolis en ekspozicioj de hungaraj artistoj en Londono, Stokholmo, Moskvo, Pekino, Sofio kaj Bukaresto.

I. Pál Nolipa estas engaĝita homo kaj engaĝita artisto, do estas evidente, ke li ekceptis jam kiel junulo ankaŭ la ideon de internacia lingvo, Esperanto. Multnombrajn kreaĵojn li signis kiel esperantisto: Stefano P. Nolipa.

— gm —

LAJOS TÁRKONY SEPDEKJARA

La nomoj *Ludoviko Totsche, Lali Blond, Lajos Tárkony,* kovrantaj la saman personon, ĉiam sonis konataj kaj karaj dum la lasta duonjarcento al la legantoj de la ĉefaj literaturaj organoj, ekde Literatura Mondo ĝis la Nica Literatura Revuo. Lia nomo ne tiel brue populariĝis, kiel tiu de la granda hungara duo Baghy—Kalocsay, sed tio ŝuldiĝas unuavice al lia modesta, silentema personeco. Lajos Tárkony, kiu cetere jam la kvinan jaron sidas inter niaj *senmortuloj,* en 1972 plenumas sian 70-an jaron. Lia poeta, eseista kaj tradukista vivoverko nepre meritas specialan atenton ĉe tia jubileo.

Li esperantistiĝis en 1919, kaj jam samjare aperas en *Hungara Esperantisto* lia unua noveltraduko. *Literatura Mondo,* ekaperanta en 1922, havas lin kiel unu el siaj redaktoroj, kaj al tiu ĉi revuo li restas fidela dum ĉiuj tri periodoj, ĝis ĝia lasta numero. Li debutas per tradukoj, kaj precipe kritikoj kaj eseoj: li estas nia unua *vera* kritikisto. Kun amo kaj delikata sentemo li analizas la kuntempanan literaturan produkton, tamen tio ne malhelpas al li starigi indajn kriteriojn kaj postulojn. Lia pasia amo al la arta belo, profunda erudicio, mirinde delikata kaj certajuĝa gusto, kaj ne laste lia france eleganta stilo faras liajn recenzojn kaj kritikojn — eĉ post pluraj jardekoj — krom preskaŭ centprocente valida studmaterialo ankaŭ agrablega legaĵo. Lia esearo — *De paĝo al paĝo,* aperinta en 1932 — estas ĝis nun nesuperita perlo de nia kritika literaturo.

Li debutis per traduko, kaj ĝis la nuna tempo li restis fidela al la tradukarto. Kun la sama ambicio li tradukas prozon kaj poezion, kaj estus malfacile trovi inter liaj multegaj tradukoj malsukcesintan pecon. Kunlaboris en la modela *Hungara Antologio* (1933), tradukis la romaneton de *Karinthy: Vojaĝo en Faremidon* (1934), kaj post Kalocsay kaj Waringhien estis la tria tradukisto en la grandioza *La Floroj de l' Malbono* de Baudelaire. Laste li kuntradukis la kronik-romanon de F. Sánta *Dudek horoj* (1966).

Liaj noveltradukoj estas konstantaj dekoroj ankaŭ de nia revuo. Multaj hungaraj verkistoj — de J. Heltai ĝis Gy. Moldova — ekparolis en Esperanto pere de lia plumo. Interese, ke poezion apenaŭ li tradukis el la hungara, videble la francaj poetoj estas pli korproksimaj al li.

Malgraŭ lia eminenteco kiel kritikisto kaj tradukisto, plej grave li kontribuis al nia kulturo kiel poeto. Lia poezio — kies nivelo estas mirinde konstanta: malbonan poemon ne ellasis lia plumo — havas tute individuan tonon: ĝin karakterizas unuavice profunda lirikeco kaj sentoriĉo. Lia poezia lingvo estas preskaŭ unika per sia kapablo esprimi kun facilo eĉ la plej delikatajn, plej personajn kaj plej flugemajn sentojn. En tiu senco la poezia lingvo de Tárkony estas aparte valora por ni, ja neniu pli efike ol li rifuzis la

ÁGNES LUKÁCS

Ŝi estas la plej juna el la esperantistaj artistoj, kiujn ni prezentas en tiu ĉi numero de Hungara Vivo, kaj somere en Hungara Kulturfestivalo. Ŝi estas 51-jara, sed ŝian vivkoncepton kaj „arton poezian" difinis la jaroj antaŭ 1945. Fininte la belartan altlernejon, ankaŭ estis trafita de teruraj travivajoj: somere de 1944 la deporto al Aŭschwitz, kaj al aliaj lageroj en la faŝista Germanio. Sur la brako ankaŭ hodiaŭ videblas la tatua numervico, kiel en la animo kaj nervoj ŝi kunportas neniam forgeseblajn spertojn. Eldonita en 1946 grafikaĵ-serio, nomita „Aŭschwitz, virina lagero", estas konsterna per ĉi tiu konata temo.

Longtempe ŝi pentradas kaj desegnas laŭ tradicia stilo, sed en la lastaj jardekoj ankaŭ ŝi eksperimentas per novaj artospecoj kaj iloj. En la studentklubo de la Universitato Lóránd Eötvös *en 1970 ŝi ekspoziciis paper-glubildojn. En numero 1970/4 nia revuo prezentis de ŝi virinan porteton, glubildon.*

Ŝi instruas desegnon kaj arthistorion ekde 1955. Siajn kreaĵojn oni povis vidi en multaj enlandaj kaj eksterlandaj ekspozicioj. Lukács konatiĝis kun Esperanto en 1956, ŝin instruis Ludoviko Kökény. Kiel arta kunlaboranto, ŝi partoprenis en la redaktado de Hungara Vivo.

— gm —

teorion pri maleblo de beletro Ea.

Tárkony (tiam: *Totsche)* estis unu el la dekduanoj: liaj poemoj, aperintaj en la antologieto de Kalocsay, jam antaŭpromesas grandan poeton. Unu el la poemoj, aperintaj tie, *Triopa trista gard'* estas nepre inter la dudek plej bonaj poemoj de nia okdekjara literaturo.

Kvankam li neniam ĉesis verki poezie, pro la malfavoraj cirkonstancoj dum 31 jaroj li ne sukcesis eldoni propran poemaron. Krom la tre bone elektitaj pecoj en la Auld-a antologio en 1959, liaj poemoj aperis en kelkaj revuoj, ĉefe en *Literatura Mondo, La Nica Literatura Revuo, Norda Prismo* kaj *Hungara Vivo.* Estis vera festo por nia literaturo, kiam en 1965 ĉe la eldonejo *Stafeto* aperis lia poemaro, *Soifo.*

La volumo enhavas la zorge selektitan kaj redaktitan poezian vivoverkon de nia poeto. *Soifo* ne hazarde trovis plaĉon ĉe la esperantistaj poeziamantoj: ĝia esenca kohereco estas surpriza, sen ia intenco aŭ suprajaj manovroj ĝi estas kvazaŭ lirika aŭtobiografio de Tárkony.

En sia antaŭparolo al *Soifo* Kalocsay dividas lian poezion en kvar periodojn. Lia periodigo estas plene akceptebla, eble nur la ciklojn *Tririmoj* kaj *Hellado* oni povus transigi al la kvara periodo, aŭ eĉ konsideri aparta periodo, ja la Kajjam-specaj *Tririmoj* (kiujn mi emas konsideri ne pli ol lerta versa omaĝo al pli-malpli meritplenaj personoj, sen la trafe pika spico de la Kalocsay-aj *Rimportretoj)* kaj la rifuĝkaraktera mitologia aventuro en la ciklo *Hellado* akre diverĝas de la pli realaj, konkretaj poemoj.

Kiel unua periodo de lia poezio oni povas rigardi la ciklon *Fruaj versoj,* kiu inkluzivas la poemojn, aperintajn en *Dekdu poetoj,* plus kelkajn el la jaroj 1935—36. Kiel jam menciite, jam en tiu ĉi ciklo ni povas ekkapti la aŭtentikan Tárkony-voĉon: la baza tono de lia poezio ne ŝanĝiĝis eĉ ĝis nun; ĝia plej karakteriza trajto estas ia delikatsenta, sordinita melankolio, kiun dependa de la humorondado de la poeto spicas pli-malpli profunda amaro. Reprezenta peco de la ciklo estas la poemo *Triopa trista gard',* kiu sola enhavas la tutan esencon de la Tárkony-a poezio.

Sendube, tiu ĉi amara melankolio ne malmulte ŝuldiĝas al psikaj kialoj, sed grave kontribuis al ĝia naskiĝo ankaŭ la prema atmosfero de la koncerna historia periodo, kies tension Tárkony tre bone sentis, kiel la poemo *Aŭskultado* atestas.

La poemoj de la dua periodo (la ciklo *Nek verso nek prozo)* senpere antaŭsentas la militon, la baldaŭa mondmasakro ĉeestas en ĉiu verso. La ciklo enkondukiĝas jene:

Nek verso nek prozo,
senforma kiel la kaoso,
kiel mallumo, de kiu knabo hororas,
kiel rememornebulo,
kiel sopiro je surbrusta lulo,
kiel vizaĝo de tiu, kiu ploras...

La ciklo konsistas el rimitaj liberaj versoj: la disfalo de la striktaj formoj kaj la malstreĉaj poemkonstruoj iel jam konjektigas la disfalon de ĉio, kio ĝis tiam ŝajnis certa kaj firma. Unu el la plej signifaj poemoj de la ciklo estas *Krepusko en la urbo,* pri kies atmosferkapto kaj

ZOLTÁN VÁLI

Kiel la alia partoprenanto de ekspozicio de Hungara Kulturfestivalo, ankaŭ li ne estas juna homo. Li naskiĝis en 1910. La epoko de lia homa kaj arta maturiĝo estis Hungario kaj Eŭropo inter du mondmilitoj. Legante pri esperantistaj artistoj en ĉi tiu numero, vi jam certe rimarkis la saman trajton: ilia vivovojo kondukis al tiuj, kiuj batalis por la evoluo kaj paco de la homaro. Ĉu oni povas diri, ke tiu vojo estis laŭleĝa?... En la vivovojo de talentaj artistoj. kreintaj en tiu maljusta socio, terura epoko, certe jes.

Zoltán Váli suferis en malliberejoj de Horthy-Hungario feŭdala, poste li batalis en la hispana civitana milito, kaj vivis en francaj internigejoj, kiel iama soldato de la internacia brigado. En la tempo de la dua mondmilito li luktis por la franca popolo. Li desegnis kaj multobligis afiŝojn kontraŭ faŝista armeo. Kompreneble sennome, eĉ liaj amikoj sciiĝis nur post la liberigo de Parizo, ke la popularajn efikajn afiŝojn kreis Váli.

Li revenis el Francio en 1948, hejme estis dum jaroj unu el la organizantoj kaj gvidantoj de la hungara arta vivo.

Liajn artaĵojn oni povis vidi en multaj ekspozicioj. Ankaŭ lia edzino estas belartisto kaj esperantisto, ili ambaŭ partoprenas en la nuntempa Esperanto-movado.

— gm —

---

simbolaj interpret-ebloj oni povus plenskribi plurajn paĝojn.

En la sama periodo verkiĝas ankaŭ la sonetciklo *In memoriam tuam,* kie la poeto en dekduo de alterne ĉarmaj kaj korširaj sonetoj rakontas la historion de neplenumiĝinta amo.

Al la tria periodo klasiĝas la postmilitaj poemoj (la ciklo *Haŭtŝanĝo),* kies plej karakteriza trajto estas la *vivemo.* La vastaj ebloj de la futuro en la liberiĝinta lando forgesigas al li la antaŭajn suferojn.

La ciklon enkondukas la sescentversa odo *Okcidento,* kiu krom esti eta kulturhistorio, estas kvazaŭ programo por la estonto: jen la humo — diras la poeto — el kiu la konstruantoj de la estonto povas ĉerpi inspiron, instruon kaj forton, kvankam la lastaj dudek versoj jam sonigas dubemajn kordojn.

Tamen la entuziasmo de la postmilita konstruado de la nova mondo lin kaptas. En la poemo *Portreto* kun agema kritiko li prezentas la etburĝon-faŝiston, dum *En hospitalfenestro* jam li — kies „triopa trista gard'" estis *silento, solo kaj vespero* — petas jene:

Atendu, homoj, nur minuton!
Ne ludu sen mi tiun ludon!
En plan' mi estu molekulo,
fajrer' mi estu en la lukto-brulo,
kaj se necese, kamaradoj,
ke por libero kaj futuro ni skermu
(ho min el ĉi futur' ankoraŭ ne
elfermu!),
mi ankaŭ estu tie sur la barikadoj!

Ekzistis reala espero, ke la poeto de la amara melankolio kaj trista belo vere ŝanĝos la haŭton, sed tiun esperon forblovis la periodo, kiam — per la vortoj de *Emba* — „la turto kantis false".

Malgraŭ tio la poeto donacas al ni en sia kvara periodo mirinde belan poemciklon, la *Inventaron.* En ĉiuj nuancoj reaperas la tono de la *Fruaj poemoj.* La poeto jam rezignis pri la eblo de la disrompo de la *vitromuro,* kiu staras inter li kaj la socio. Aperas la atmosfero de la maljunaĝo, kiu mildigas la amaron, sed faras definitiva la melankolion. La nostalgioj — eĉ se ne tute malaperas — estas multe pli nerealaj, pasemaj, ol antaŭe.

La liriko de Tárkony estas nepre la plej persona poezio en nia lingvo. Li dissolvas la realon en sia individuo, kaj tiel li prezentas ĝin al ni, sed tiu kunfandiĝo de la ekstera kaj interna mondoj havas neripeteblan kaj ensorĉan aromon. Lia poezio forte ligiĝas al neesperantistaj literaturaj tradicioj: multe lin influis la francaj simbolistoj kaj impresistoj, kaj ne laste la hungara *Nyugat*-generacio. La malfavoraj cirkonstancoj — personaj kaj sociaj — malebligis al li la disrompon de la *vitromuro,* kaj pro tio rekta socia orientiĝo nur sporadas en liaj poemoj. Per sciencema analizo oni povus demonstri kaj kritiki tiusencajn mankojn, sed samtempe estus necese agnoski tiujn rekompencajn atingojn, kiuj ŝuldiĝas al li sur la kampo de la priskribo de la interna mondo de la individuo. Sed eĉ sen tio, kion ajn kritiku mi, aŭ postaj pritaksantoj de lia verkaro, lia poezio neniam perdos la „aktualecon", neniam fariĝos polvokovrita literaturhistoria kuriozaĵo, dum oni legos en nia lingvo, lia poezio ĉiam klasiĝos kiel *viva* literaturo. Poeto pli belan ol tio ne povas deziri.

Vilmos Benczik

PÁL VARSÁNYI

Li naskiĝis en 1902 en Budapeŝto, sed en la hungara artvivo delonge estas nomata „granda maljunulo", eble tial, ĉar sian originalan talenton frue li sukcesis demonstri, kvankam li estas vere eksterordinare modesta, sentema, retiriĝema homo.

La partoprenontoj de Hungara Kulturfestivalo povos vidi la ekspozicion de ses Esperantaj artistoj. Inter ili rolos la kreaĵoj ankaŭ de Varsányi, kies kariero traarkas jam duonjarcenton. Liaj ligno- kaj linoleo-grafikaĵoj estas poezie belaj, konvinkfortaj; la aluminio-grafikaĵoj el la lastaj jaroj montras la plej freŝan produktadon de junuleca eksperimentemo.

Enlanda kaj eksterlanda publiko ekkonis lian nomon kiel de ege engaĝita, revoluciema artisto. En la tridekaj jaroj lia lignografikaĵa serio protestanta kontraŭ faŝismo, en pluraj landoj de Eŭropo akiris al li popularecon kaj amikojn, kiel ekzemple Romain Rolland.

Post multnombraj individuaj kaj komunaj ekspozicioj, pasintjare, okaze de 500-jara jubileo de la granda hungar-devena Albrecht Dürer, li ekspozicis en Budapeŝto sep belajn lignajn kaj aluminiajn grafikaĵojn.

Ekde 1923 li estas esperantisto, kunlaborinto de Literaturo Mondo. — Vi povas legi pli detale pri lia arto en numero 1965/3 de Hungara Vivo, de Ludoviko Kökény.

— gm —

LAJOS TÁRKONY

TRIRIMOJ

MATENO

Solviĝas jam la nokta dormkateno,
mi membrostreĉas kun lasciva beno:
traširas la kurtenan ĉerkotolon
la revivig-miraklo de l'mateno.

HOMLIMO

Cerbul' tro cerba, kreitaĵa krono,
vin vane pelas fantazia sprono
trovi en kosmo fraton por lin murdi:
vi restos en la sunsistem-prizono.

TEKNIKO

Al frato Bacon[1] brilis tra l'animo
futuraj riĉoj, evolu' sen limo,
en liajn ĉelajn revojn ne miksiĝis
napalmo, polucio[2], Hirošimo.

AŬTOJ

Jen aŭtoj, aŭtoj staras en spaliro
densege, ĉar ne eblas plu la stiro.
Ĉu la homar' ĝisvivos do la benon
de brava rajdo, pia piediro?

[1]Roger *Bacon:* franciskano, scienculo, moralisto, antaŭvidinto de teknikaj mirindaĵoj (1214—1294).
[2]*Polucio* (PIV): venena malpurigo de la medio de l'homvivo.

Ĉapitroj el la Hungara Muzikhistorio

II. Mizero en la lando — brilo en la muziko

Kiam la hungaroj fondis sian ŝtaton ĉirkaŭ la fino de la unua jarmilo, kune kun la transpreno de la kristana religio multaj okcidentaj kulturaj elementoj penetris en ilian landon; ankaŭ multaj muzikaj influoj.

Unu el la plej fruaj muzikaj verkoj, kiuj konserviĝis el tiu epoko, estas la *Lamento de Maria* el la 12. jarcento. La melodio devenas el Francio kaj estis verŝajne trubadura kanto en sia originala formo.

La hungaraj parencoj de la francaj trubaduroj estas la kroniko-kantistoj. Ili prikantis la heroan pasinton de la popolo, entuziasmigajn baladojn de konataj herooj hungaraj, ili kantis pri la praavoj kaj la okupo de la patrolando. Kompreneble multaj fremdaj, precipe francaj naciaj temoj aperis en tiuj ĉi hungaraj kronikaj kantoj, montrante okcidentajn influojn en la hungara kultura vivo.

En la sekvaj jarcentoj, sub la regado de la tiel nomataj diversfamiliaj dinastioj (Anjou, Luxemburg, Jagello) kaj precipe dum la tre mallonga nacia regado de la familio Hunyadi — en la 14. kaj 15. jarcentoj — konsiderinde plimultiĝis la skribaj dokumentoj, montrantaj florantan kulturan kaj muzikan vivon en Hungario. Ĉe la kortego de reĝo Matiaso Korvino, ano de la familio Hunyadi, multaj el la plej famaj muzikistoj de tiu epoko vizitis Hungarion kaj laŭdis la gloron kaj brilon de la tiama altnivela hungara muzika vivo.

Post la morto de reĝo Matiaso la feŭdala anarhio ekregis en la tuta lando; la grandmezura kamparana ribelo kaj ties subpremo farita kun senekzempla, eksterma krueleco pli kaj pli profundigis la mizeron kaj malfortigis la defendkapablon de la lando kontraŭ la ekstera malamiko. Tiamaniere la turka grandpotenco post nelonge povis okupi grandan parton de Hungario kaj teni ĝin dum proksimume 150 jaroj. Hungario fariĝis milita tereno kaj disiĝis en tri partoj: landparto kie regis la Habsburga dinastio, alia parto, kiun posedis la turkoj kaj la tiam sendependa Transsilvanio. Krom ĉi tiuj negativaj historiaj cirkonstancoj aperis sur la scenejo de la historio la reformacio, kiu kaŭzis religian partiomiliton, sed en kies fundo plej ofte kaŝiĝis politikaj celoj.

Dum tiu ĉi historia ĥaoso evoluis en Hungario florepoko de literaturo kaj muzikkulturo. En 1520 monaho notis hungaran popolmelodion, kiu eĉ ĝis la nuna tempo vivas kiel infankanto. Popolkantoj vivis sur la lipoj de la popolo tiam jam de multaj jarcentoj, sed nun okazis en la hungara historio la unuan fojon, ke intelektulo, skribosciulo, notis tian melodion, kiel simbolon kaj signon de nova mondpercepto.

La plej interesa kaj plej fama persono de la tiama muzikhistorio estas la historio-kantisto Sebestyén *Tinódi Lantos.* Grandan popularecon li atingis unuavice per siaj belaj kaj ĉie konataj *melodioj* de versaj kronikoj. Tinódi estas en Hungario la plej granda reprezentanto de la memstara, nacikaraktera nova muzika artospeco: la historia kanto.

Ĉi tiu nova, speciale hungara artospeco konservis multajn malnovajn melodiojn. Kaj ĝi ekregis en ĉiu parto de la socio: ĝi fariĝis trezoro de la tuta popolo.

La historia kanto ne limiĝis je kronikaj temoj; ĝi estis kolekto de diversaj specoj de kantoj — ĝia temo povis esti biblia, aktuala okazintaĵo, kronika novaĵo, eĉ novela aŭ romana rakonto (ĉi tiun lastan specon oni nomis „bela historio"). Ankaŭ moralaj, satiraj aŭ anekdotaj temoj trovis lokon en la kadro de la *historia kanto.*

La historiajn kantojn prezentis plej ofte la poetoj kaj komponistoj mem — studentoj, instruistoj, predikantoj aŭ migrantaj soldatoj ktp. En multaj okazoj ĉi tiuj migrantaj kantistoj havis konsidereblan instruitecon akiritan ĉe eksterlandaj universitatoj. La prezentado okazis ĝenerale kun akompano de unu muzikinstrumento, plej ofte kun la tiam moda liuto. La kantistoj kantis siajn kantojn kompreneble ne monotone; ili zorgis pri tio, ke ĉiu strofo eksonu variiĝe, kaj la kanto fariĝu tiamaniere interesa. Ĉi tiu praktiko estis la sama kiel ĉe la hungara kamparana kanto, kiu estas aŭdebla ankaŭ en nia tempo. Bedaŭrinde nur la tekstoj kaj melodiskeletoj postrestis el tiu tempo ĝis nun, pro tio ni povas nur konjekti la prezentadmanieron de la tiamaj historiaj kantoj. Sed la postrestintaj melodioj mem estas artaj-muzikaj trezoroj ne nur de la hungara muzikhistorio, sed de la tutmonda muzikkulturo.

Dr. Lajos Lesznai

Sukcesa turneo de la Hungara Radio-orkestro en Usono

Fine de la pasinta jaro dum sia unumonata turneo en 25 urboj, en 15 nordamerikaj ŝtatoj, en 26 koncertoj unue debutis la Radio-orkestro ĉe la publiko de la malproksima kontinento. Post la eble plej sukcesa koncerto aperis en la „NEW-York Times" eksterordinare rekona kritiko el plumo de Harold Shonberg, la plej fama amerika muzikkritikisto.

Jam eĉ la titolo de tiu ĉi dukolumna artikolo diras multon: „Muziko kiu atingas la plej altan ŝtupon." Jen kelkaj karakterizaj frazoj el la apreco: „La Budapeŝtaj Simfoniistoj entute estas unuaranga orkestro, kiu merite estas komparebla eĉ al la plej altnivelaj ensembloj." Pri György Lehel skribis Shonberg jene: „György Lehel pruviĝis fortoplena kaj firma muzikestro, kiu tenis la muzikon en konstanta moviĝo, sen tio, ke ĝi estintus maltrankvila kaj stentora. Generale ĉi tio karakterizas la bonan muzikiston. Li sentigis sian ĉeeston, sed ne kiel primadono, kiu ĉiamaniere volas direkti la atenton al si mem, — sed kiel elemento de la mekanismo."

La plimulto de la aperintaj kritikoj ankaŭ parolis kun entuziasmo pri la orkestro, inter ili ankaŭ tiel signifa gazeto, kiel la Washington Post. Kiel rezulto de tio ĉi, jam en ilia ĉeesto komenciĝis la pritraktadoj pri la sekva turneo, kiu versajne estos okazanta post du jaroj, en pli vastaj kadroj. Kun muzikestro György Lehel oni traktadis ankaŭ aparte pri sia gastrolo kune kun usonaj orkestroj.

Tr. Nyitray

Favorato de infanoj — plenaĝuloj la kremfarĉita

BUDAPEST-FLIPP

Ricevebla en la ĉefurbaj manĝaĵ-vendejoj

György Mikes

Bibliotek—ordigado

1.

— Antaŭ unu kaj duono da jaroj vi promesis, ke vi traaranĝos vian bibiotekon — diris mia edzino. — Mi pensas, ke estas jam tempo komenci tion. Terura estas ĉi tiu ĥaoso.

— En ĉi tiu ĥaoso ekzistas sistemo — mi respondis nervoze. — Kaj mi povas bonege min orienti en ĝi.

— Ne estu pigra! Foje oni jam devas tion komenci. Vi deprenos la librojn, mi senpolvigos ilin, poste ni remetos ilin sur la bretojn.

— Estas en ordo — mi diris amare kaj malplenigis iun el la kolonoj da fakoj, en kiu — mi kalkulis — troviĝis tricent kvindek libroj. Mia edzino senpolvigis la librojn — ankaŭ mi ŝin helpis — kaj poste mi remetadis la volumojn sur la bretojn.

Escepte kvindek librojn. Tiuj jam ne havis por si lokon tie.

2.

— Tio estas malebla — diris mia edzino surprizite. — Ili devas havi tie por si lokon, se foje ili jam estis tie.

— Vi ne konas la librojn — mi diris envolviĝinte en polvonubon, ĉar mi frapadis la librojn unu al la alia. — Kelkfoje ili kondutas tute strange.

Mia edzino propramane rearanĝis la librojn sur la bretoj, kaj kiam ŝi finis la laboron, okdek libroj kuŝis sur la planko.

— Mi ne komprenas — ŝi flustris malespere. — Mi ne komprenas, kiel tio povis okazi...

3.

La kromrestintajn okdek librojn ni devis ie loki. Por trovi por ili lokon, ni malplenigis alian kolonon de fakoj. Deprenante, senpolvigante, remetante, ni ambaŭ laboris senvorte, febre. Kiam la edzino finis la remetadon de la libroj, jam almenaŭ cent kvindek aŭ ducent libroj kuŝis sur la planko.

— Strange — ŝi diris, polvkovrite ĝis la oreloj. — Mi forte interpremis la volumojn.

— La librojn ne licas movi. Ili tion ne amas.

— Ĉu ili tion amas, ĉu ne, nun jam spite mi ne cedos pri la afero.

Kiam ankaŭ la tria kolono da fakoj estis preta, kvarcent libroj kuŝis ĉirkaŭ ni.

4.

Post la traaranĝo de la kvara fako-kolono da libroj ni jam ne povis eĉ movi nin pro la libroj: ĝisgenue ni vadis en la klasikuloj.

— Mi kapitulacas — mi diris al mia edzino kaj kaduke falis sur amason da vojaĝlibroj. — Ni aĉetos novajn librobretojn.

— Eĉ temi ne povas pri tio! Tiel la afero ne povas resti. Ni komencu ĉion denove. La libroj devas rehavi por si lokon.

Ili ĝin ne rehavis. Ĉirkaŭ okcent libroj kuŝis dise: sur la planko, sur la seĝoj, sur la supro de la ŝrankoj, sub la lito.

— Kial vi ne helpas?

— Ĉio estas vana. La libroj nin venkis...

5.

Mi sidiĝis sur serio da biografioj kaj ekfoliumis la persajn poetojn.

— Hontu! — ŝrikis mia edzino kaj forbatis el mia mano la libron. — Kiel vi povas legi en tia malordo?

— Min la malordo ne ĝenas — mi diris kun stoika trankvilo kaj levis de la planko alian libron: „Paĉjo Goriot" de Balzac. Jam delonge mi scias, ke la libroj, se oni prenas ilin de sur la breto, plimultiĝas kiel leporoj. Ekstere sur la kampoj oni ofte povas vidi librojn kromrestintajn, forvagintajn el librošrankoj, de sur librobretoj. La librantikvaĵistoj aranĝas de tempo al tempo pelĉasadon kontraŭ ili per retoj, kaj, se ili havas favoran tagon, ili kaptas da ili eĉ plurajn centojn.

6.

Mia edzino estas de obstina naturo, ŝi ne ĉesigis la bataladon. Kvina-foje, sesa-foje, eĉ deka-foje ŝi traaranĝis mian bibliotekon. De tiam mi ŝin ne vidis. Verŝajne ŝi dronis en la maro da libroj. En silentaj noktoj mi kelkfoje aŭdas ŝian voĉon: „Ĉiu libro devas rehavi por si lokon sur la breto... ĉiu libro... sur la breto..." Sed povas esti, ke ne ŝian voĉon mi aŭdas. Povas esti, ke nur la trablovo foliumadas en la senferme lasitaj libroj.

Tr.: *K. K.*

GLOSOJ

engaĝi: 1) kontrakti kun aktoro pri ludo de rolo aŭ pri partopreno en teatra ensemblo dum difinita daŭro; 2) fari, ke iu partoprenu iel en iu afero, devontigi (engaĝitaj, neengaĝitaj ŝtatoj; engaĝita verkisto = verkisto rigardanta iun aferon kiel la sian kaj spontane sin deviganta verki en ties intereso);

hobio: eksterprofesia preferata okupiĝo (*maroto* PIV);

metastazo: transmetiĝo de malsanfokuso, malsancentro, aŭ de responseco;

taŝismo: arta skolo proklamanta arto la hazardan apudiĝon de masoj aŭ koloraj surfacoj;

lagero: koncentrejo

sordidla: malpurega (ankaŭ morale).

LEGAĴOJ

Infanbuŝo

1.

La trijara Sofia ege amas la etajn, lanugajn anasidojn, postiras ilin diligente, prenas iun en la manon, kaj kiam ĝi ne moviĝas, deĵetas ĝin. Ŝia patrino ŝin minacas:

— Atentu, se mi sciiĝos, ke vi refoje persekutos la anasidojn, mi instruos vin pri moroj.

— Sed kiel vi sciiĝos pri tio?

— Nu, — diras la patrino —, ili diros al mi tion.

La etulino, kompreneble, forgesas baldaŭ la admonon. Ŝi ekiras post ili. Tiam la patrino venas el la kuirejo, tenante pladon plenan de maizgrajnoj kaj urtikfolioj. La anasidoj vigle paŝadas en ŝia direkto, bleketante: „Hap, hap, hap". — Ho, ho — ekkrias la etulino, ekvidinte sian patrinon. — Ili jam iras min denunci!

2.

Du infanetoj ludas en la korto. Joĉjo hazarde puŝas la pli malgrandan Miĉjon kaj ĉi tiu falas. Poste li ploraĉas:

— Mi diros al panjo, ke pro vi miaj manoj kotiĝis.

Joĉjo devišas la koton. Miĉjo ploraĉas plu:

— Tamen mi diros!

Joĉjo diras kolere:

— Eh, mi fajfas pri vi!

Miĉjo kuregas al la patrino:

— Panjo, Joĉjo diris, ke li fajfas pri mi.

— Nu, — diras la patrino —, diru al li, ke ankaŭ vi fajfas pri li.

Sed Miĉjo ploraĉas plu:

— Panjo, mi ne scias fajfi! Bruhuhuhuhu! — *gng* —

INTERESAĴOJ

El nia cerbo-kapacito, ĉe normala ŝarĝado de nia intelekta kapablo, ni utiligas sole la kvaronon, dum ĝiaj 75 procentoj restas konstante nenifaraj, — konstatis dro Jefremov, soveta medicin-profesoro. Uzante la duonon de nia cerbo-kapacito, ni kapablus alproprigi kvardek fremdajn lingvojn.

~

Sveda junulo 17-jara imagis sin birdo en sia LSD-ebrio, kaj kun diseetenditaj brakoj, nude li ĵetis sin malsupren de sur la tegmento de magazen-konstruaĵo. La spektaklon, laŭ la atestantoj, li ripetis trifoje, kaj ĵus li rampis la kvaran fojon sur la tegmenton, kun rompita brako, kiam la policanoj alvenintaj lin deprenis kaj urĝe ekspedis en hospitalon.



Turistoj povas aĉeti en Budapeŝto kontraŭ konvertebla valuto artaĵojn el porcelano, vitro, bronzo, metalo kaj ligno, krome lignoskulptaĵojn, malnovajn kaj novajn monerojn, medalojn – kun permeso de la Nacia Muzeo kun sendogana eksportado en la antikvaĵvendejoj

KONSUMTURIST

I., Hess András tér 3. (placo ĉe preĝejo Matiaso)
V., Hotelo Intercontinental-Pergola
VI., Avenuo Népköztársaság útja 27. (kontraŭ la Operdomo)
XI., Placo Szent Gellért tér 1. (Hotelo Gellért)

Lajos Tárkony

REVUO DE REVUOJ

Kompreneble, antaŭ ĉio mi salutu la revuon NORDA PRISMO, ĉi tiun knabinon longe opiniatan mortinta. Klariĝis, ke ŝi nur dormis, kaj, laŭ onidiroj, ŝi estas de fortika sano kaj havas ankaŭ belan doton (monon kaj verkmaterialon), eĉ pli ol sufiĉan. Ŝi vivu do longege kaj duoble vigle post la unujara ripozo!

— Koncerne la numeron 1972/1. oni povas diri, ke ĝi estas agrable varia. La „skiza portreto" de *V. Benczik* pri *Stanislav Schulhof* kvitigas malnovan ŝuldon tre lerte, klarvide kaj leginde. La recenzo pri la granda HEINE-volumo, fare de *W. Auld,* kompetente kaj laŭmerite taksas ĉi tiun literaturan eventon. Interese kaj preskaŭ mikroskope esploras la versaron „Sekretaj Sonetoj" *M. Duc Goninaz;* mi trovis tre ĝusta lian rimarkon, ke „el lingva vidpunkto ĝi estas superriĉa, tro riĉa eĉ...", kaj pli grandan honoron li ne povus al ĝi doni, ol ke, laŭ li, „ĝi memorigas la verkojn de Rabelais". — Ĝoje mi vidis la tradukaron de *Hilda Dresen,* admirante ŝian nelacigeblan fervoron en la konigo de la estona poezio. — Sub la interesa noveleto de *M. Seabra* mi trovis noton, ke ĝia portugallingva originalo ne povis aperi pro la cenzuro. Nu, mi provis min imagi plej severa cenzuristo kaj en tia rolo mi trifoje, eĉ kun lupeo, tralegis la tekston, sed nenion riproĉeblan, revolucian, ŝtatrenverseman mi povis malkovri; ŝajne mi estus tre sentalenta cenzuristo. Jes, ĉar mi estus ĝin varme rekomendinta: ĝi finiĝas ja per tia neŝancelebla virina optimismo, ke por multaj poetoj oni bezonus ĝin preskribi kiel devigan legaĵon. — *W. Auld* recenzas ankaŭ la verslibron „Kvin elementoj" de *Edwin de Kock.* Pri la senco kaj esenco de la volumo, pri ĝiaj kvalitoj kaj kelkaj animkaptaj partoj, mi pensas, ĉiu povas kun li konsenti, sed kial ree diskuti pri metriko? Tiun diskuton E. de Kock mem provokis per siaj primetrikaj teoriadoj. Krome, Parnasa Gvidlibro tute ne postulas ekskluzive la metrikon jamban: ĉiuj eblaj metrikoj ascendaj kaj descendaj estas en ĝi registritaj, eĉ en tiu libro, nomata eksmoda kaj ŝima, ankaŭ la libera verso estas pritraktata. — Sur la 279. paĝo de la revuo troviĝas poemo de *M. Seabra.* Kaj jen, en ĝi mi trovas kvar purajn rimojn, tri asonancojn kaj nur unu senriman vers-paron — ĉu tio estas regreso? — La lasta artikolo, subskribita de *S. S.,* asertas, ke la homo havas batalinstinkton kaj ĉar Eo estas la lingvo de la paco, ĝi ne povas venki en la sovaĝaj hom-animoj. Nu, la homo, krom la batalinstinkto, havas ankaŭ socieman instinkton (se ne paroli pri la denaskaj „moral-malsanuloj"). Kiu el tiuj du instinktoj superregas, pri tio decidas la cirkonstancoj (familia edukado; ekzemploj en la familio kaj la eksterfamilia medio; la ĝenerala socia ekvilibro; tia stato, en kiu eblas kontentigi la bezonojn sen malfacile tolereblaj fortostreĉoj ktp.). Inter favoraj cirkonstancoj la ordinaraj homoj, do la plejmulto, lasas trankvile dormi sian batal-instinkton. Ne nian *naturon* oni devus modifi, kiel la aŭtoro skribas, sed tiun staton, ke ĉe superevoluinta tekniko popoltavoloj vegetas mizere kaj milionoj malsatas; ke ekzistas pli kaj pli granda strečo inter la evoluo de la produkto-fortoj kaj la socia sistemo.

Pri la HEROLDO DE ESPERANTO mi ĝoje konstatas, ke en nia mondo de „gazetara morto" ĝi tenas la fronton forte, kuraĝe kaj akurate, kaj ĝojigas siajn legantojn de tempo al tempo eĉ per aldonoj; ĝis nun aperis teknika-scienca kaj literatura. Mi laŭdas kaj gratulas ankaŭ ĝian ne tre kutiman gazetaran solidarecon: ĝi jam trifoje nin menciis, aŭ citis el ni. Mia romantika animo fantazias ĉi tion kiel flag-saluton de du ŝipoj navigantaj sur „mare nostro" Esperanto.

La ESPERANTO de UEA lastatempe ŝajnas fari klopodojn por ne esti nura movada gazeto: ĝi publikigas noveleton kaj dediĉas eĉ paĝon por komencantoj donante facilan legaĵon kun lingvaj klarigoj. En la n-ro 1972/1. *E. L. M. Wensing* skribas multon pripensindan kaj observindan, sed li ŝajnas iom malŝateti la signifon de la Ea literaturo. Oni povas diskuti pri tio, por aŭ kontraŭ, sed eble oni povus demandi, ĉu tio estas tiel aktuala ĝuste en la Internacia Librojaro. Certe, estas tre bedaŭrinde, ke ne ekzistas eĉ unu moderna Ea lerno-libro por usonanoj, kaj urĝas eldoni tian, sed tamen mi ne interŝanĝus por ĝi la E-bibliotekon de la Centra Oficejo. — Mi ne povas ne konsenti kun *Emilia Lapenna* koncerne ŝian plendon, ke oni eldonas „ŝekspirajojn", epopeojn (ekz-e Sinjoro Tadeo, Dia Komedio, Kalevala), sed ŝi renkontas amaregajn spertojn serĉante eldoniston por siaj novstilaj teatraĵoj. Fakte, ŝi estas prava. Tiuj „libroj por neniu", kiel ŝi nomas ilin, eltenos ankoraŭ kvindek, cent, ducent jarojn, dum ŝiaj verkoj probable timas suferi tian prokraston. Ankoraŭ ion. Ŝi raportas en Norda Prismo pri la kulturaj aranĝoj de la UK en Vieno. Ŝi notas, ke ĝi ne estas recenzo, nur vortofoto pri la etoso, kaj al multaj ĝi ne plaĉos. Mi konfesas, ke mi troviĝas inter tiuj multaj. Ne tial, ke la vortofoto estas severa (tian severecon ni bezonas), sed tial, ke ĝia tono estas ofende malagrabla. Oni multe pli bone toleras severan kritikon, ol tion, se oni estas supereme prenata por nenio.

Mia amiko *Gál* (kiu eble ne volas lerni Eon tial, ĉar lia nomo signifas en ĝi ion ne agrablan, cetere — inter ni — tre karakterizan) ree vizitis min dum mi luktis kun la revuotaj revuoj. Kaj li diris: „Kial viaj gazetoj estas do tiel multaj kaj tiel mizeraj? Ĉu la redakcioj nenion scias pri tio, ke oni povas akiri necesan monbazon — ekzemple — per reklamoj? Ĉu ili ne povas el ie elserĉi lertan reklam-agenton kaj, se tiu ne scias Eon, trakti kun li — Dio pardonu — krokodile?" Lia galeco min tiel paralizis, ke mi devas fini.

Konstante kreskas la nombro
de la aŭtomobiloj ankaŭ en nia patrio.
Aliparte la trafikado malrapidiĝas,
la ŝoseoj iĝis plenŝtopitaj.

JÁRMŰ ÉS MŰSZAKI
CSEPEL
KERESKEDELMI VÁLLALAT

SED

ĉu vi observis, kiel facile, rapide
preterkuras inter multaj aŭtomobiloj
la motorciklo? Tial ni konsilas ĝin ankaŭ
al vi: por trafikado, distrado, hobio

MOTORBICIKLO

Vizitu la Model-halon CSEPEL MINTATEREM



JÁRMŰ ÉS MŰSZAKI
CSEPEL
KERESKEDELMI VÁLLALAT

BUDAPEŜTO, VI.,
Bajcsy-Zsilinszky út 59.



La miljara Székesfehérvár

Jes, sudokcidente de Budapeŝto, nur en 70 km-a distanco, ĉe duona vojo al Balaton — proponas sin por vizito urbo multvizaĝa, belsitua. Haltigu do vian aŭton, descendu de sur la buso aŭ trajno, kaj restadu unu-du-tri tagojn en tiu ĉi gastinvita urbo.

Székesfehérvár estis fondita de regnestro Géza. En 977 lia posteulo, kaj en 1001 kristana reĝo, fariĝis lia filo: Stefano la I-a. Li firmigis la centran potencon, levis la hungararon en pli altan socian ordon, kaj per tio savis ĝin de la pereo. Stefano en 1016 ekkonstruigis bazilikon; tie en 1038 li estis enterigita. Poste ankaŭ 13 hungaraj reĝoj ricevis tie ĉi sian tombon.

La kronadoj, la reĝaj geedziĝoj, la ĉeesto de la reĝa krono simbolanta la centran potencon, kaj ankaŭ la landkunvenaj kunsidoj estis plej gravaj okazaĵoj de la tiama ŝtata vivo. Guste pro tio la historiistoj rigardis la urbon Székesfehérvár (Alba Regia — laŭ nov-latina nomo) la unua ĉefurbo de Hungario.

Sed, ho ve, minacis nian patrion popoloj nomadaj kaj militemaj. La tataroj bonŝance pretiris la urbon, sed la turkoj tenis ĝin dum sia nemilda regado dum 143 jaroj, ĝis 1688. La urbo preskaŭ tute senpopoliĝis. Sekvis la baroka tempo, komenciĝis grandskalaj konstruadoj, precipe ekleziaj, kaj la nuna aspekto de la interna urbo kreiĝis tiam kaj dum la sekva klasikisma periodo. En la dua duono de la 19-a jarcento la forta eklezia kaj grandbienula premado malhelpis la modernan evoluon.

La dua mondmilito kaŭzis nemezureblajn damaĝojn al la urbo. Ruinoj, ruinoj, ruinoj ĉie, suferoj kaj suferadoj de la loĝantaro. El la 40 mil loĝantoj restis post la liberiĝo nur 8 mil, kaj la fuĝintoj revenis nur malrapide.

De tiam la urbo vivas sian „renesancon". Elformiĝis tie grava industria centro. Tutlande, eĉ tutmonde estas konataj la fabriko VIDEOTON (radio kaj televido), la filio de IKARUS, ktp. Cirkaŭ la urbokerno konstruiĝis modernaj loĝokolonioj.

Sed kion rigardi en la nuna urbo mem? Spektadu, mi petas, la mezepokan Ruinĝardenon kun la sarkofago de Stefano, kun romanikaj kaj gotikaj konstru-restaĵoj, rigardu la gotikan kapelon Anna, la barokan urbodomon, la copfstilan Episkopan palacon, la Lignoskulptaĵojn de la apoteko „Nigra aglo".

Promenu sur la strato Arany János, rigardu tie la katedralon kaj artobjektajn domojn. Rigardu ankaŭ la teatron Vörösmarty, kruele dispafitan en 1945, sed poste rekonstruitan. Kaj se restos tempo, vizitu la „Bory-fortikaĵon", kiu prezentas interese kaj kaprice la arkitektajn stilojn.

La urbaj magistratoj decidis inde rememori pri la jarmilo de la urbo. La festoj komenciĝos la 23-an de marto, datreveno de la liberiĝo en 1945. Ĉi tie kunsidos la historiscienca organizaĵo de Unesko. Okazos gravaj politikaj, artaj kaj sportaj aranĝaĵoj. En la muzeo „István király" malfermiĝos ekspozicio kun objektaj kaj skribaj memoraĵoj de la urbofondo. Kaj reprezentiĝas ankaŭ la nuntempo, kiam Székesfehérvár — kun siaj 75 mil loĝantoj — releviĝis inter la unuajn urbojn de Hungario.

L. Kökény

FORUMO

sub tiu titolo la redakcio komencos novan rubrikon. En ĝi ni intencas publiki la plej bonajn, saĝajn, realigeblajn opiniojn, ideojn, proponojn de niaj legantoj por nia laboro. Do ni petas respondi tri demandojn (aŭ unu el ili) — ne tro longe.

1. Via sincera opinio pri la plej nova numero de Hungara Vivo; kio plaĉis, kial? kaj kio ne plaĉis, kial?

2. Pri kio vi legus volonte en la Hungara Vivo?

3. Via opinio pri Hungara Vivo kaj ĝenerale pri esperantlingva gazetaro: kiamaniere oni povas altigi la nivelon, enhavon, formon (tipografion) kaj disvastigon?

La plej lertan opinion aŭ utiligeblan ideon pri ĉiu numero de „Forumo" ni premios per libro. Samtempe ni komunikos la nomon kaj adreson de la gajnanto.

NUR POR VIRINOJ

Unu karakterizan kaj ŝatatan manĝaĵon de la hungara gastronomio ni prezentas al niaj karaj legantinoj. La kvantoj sufiĉas por kvar personoj.

Gulaŝsupo. — Unu mezgrandan cepon ni dispecigas al etaj kubetoj kaj en varmega graso ni fritetas ĝis la cepo iĝas orflavkolora. Poste ni aldonas unu tekuleron da ruĝa papriko — somere ankaŭ verdan kapsikon — kelkajn grajnetojn el kumino, ni salas, kaj per akvo maldensigas ĝin. Ni tranĉas al kubformo 50 dekagramojn da bovaĵo — eventuale porkviandon —, kaj en la suko malrapide duone ni moligas la viandon. Tiam ni entranĉas 2 karotojn, 1 radikon de petroselo, malmultan brasikrapon kaj apion. Kiam la legomoj preskaŭ estas molaj, ni aldonas 2 terpomojn distranĉitajn kubforme. Fine el ovo kaj el faruno — sen akvo — ni knedas farunaĵon, ĝin enpinĉetas en la supon kaj kiam la farunaĵo kuiriĝas, la supo estas preta.

Tr. Sz. B.

LA NOVA, EĈ SUPERNOVA RAZKLINGO,

samkvalita konkuranto de la plej bonaj eksterlandaj klingoj

ĈIAM RICEVEBLA! ❋ MALALTA PREZO! ❋ EMINENTA KVALITO!



RAZKLINGO

EL SVEDA ŜTALO, RUSTOREZISTA KUN TEGITA TRANĈRANDO

Fabrikata de Fővárosi Finommechanikai Vállalat
Ĉefurba Fajnmekanika Entrepreno

COFFEA ARABICA

Cu estis, ĉu ne estis? Laŭ la legendo iam en Abisenio estis paŝtisto, kiu sur la montdeklivo paŝtis gregon da kaproj. Foje li konsterniĝante vidis, ke la bestoj kondutas tre groteske. Ili transsaltadis fosaĵojn kaj arbustojn, galopis, laŭte mekadis, dancis, petoladis tiom, ke la kompatinda kaprogardisto apenaŭ kapablis hejmenkonduki ilin.

Poste tuj li kuris en la tiean monaĥejon. Li rakontis, ke diabloj obsedis la kaprojn, kaj petis helpon por elpeli tiujn demonojn. La sekvan tagon ankaŭ la ĉefmonako akompanis la brutaron al la paŝtejo kaj atendis, kio do okazos.

Li konstatis, ke la bestoj bonguste krakmaĉas la berojn de sovaĝaj arbetoj, kaj post tiu manĝado ili iĝas „obseditaj".

La saĝa monaĥo konjektis, ke en la frukto troviĝas ia stranga forto. Por fari eksperimenton, li muelis kaj kuiris la grajnojn kaj trinkis ties sukon. La efiko — same, kiel ĉe la kaproj — estis mirinda: la dormemo forflugis, la laceco ĉesis, freŝa forto eniris en la korpon, animon.

La famo pri la sorĉa eliksiro rapide disflugis ankaŭ en la araba mondo. Dzsemal Eddim, la Adena muftio multe ĉagreniĝis pro tio, ke dum la noktaj preĝoj la dervišojn ofte superregis la dormo. Do, li ordonis, ke ĉe la religia ceremonio oni trinku la „vigligan sukon".

La kafo — kiel oni nomas ĝin laŭ la etiopia urbo Kaffa — en Hungario iĝis konata dum la turka invado. Laŭ arkiva atestilo en Budapeŝto jam funkciis „kafokuirejo" en 1714. Kaj nun?

Ĉie — eĉ en la plej malgrandaj vilaĝoj — troviĝas kafejo, t.n. ESPRESSO, kie oni servas en eta taso la delikataroman, venenfortan kafon.

Laŭ onidiro, ĉe komercaj intertraktoj en kafoprodukta lando la tiea komercfunkciulo, koncerne iun mendon, demandis, ĉu tio ne estos tro malmulta por lando de pli ol cent milionoj da loĝantoj. „Sed ni nombras nur dek milionojn" — respondis la hungara negocisto. „Neeble" — miris la eksterlandano. „Kial?" — „Nu, konklude el la mendita kafo-kvanto."

Estus do erara opinio, ke nia „nacia trinkaĵo" estas la „tokaja vino", ĉar la hungaroj iĝis pasia kafotrinka, eĉ kafodrinka nacio. Krom ESPRESSO — per malgrandaj kafmaŝinoj — oni kuiras „nigron" en familiaj hejmoj, en laborejoj. Kelkloke funkcias aŭtomata aparato, kiu al la kafo — laŭ deziro — tre lerte porciumas ankaŭ laktokremon, sukeron, kaj fine ĝi ĵetas en nian tason la kuleron.

Kiam mi trinkas kafon? Kiam mi bezonas ĝin?

Matene, tuj post vekiĝo kontraŭ dormemo. En la laborejo, se ni havas iom da tempo, kaj same, se ni sidas en laboroj ĝis super la oreloj. Ni trinkas ĉe tagmanĝo, se la stomako estas troŝarĝita, kaj male, se la manĝaĵo estis iom malriĉa. Ĉe vespermanĝo tute tiel same. Oni servas por ni kafon dum negocaj pritraktadoj, dum longdaŭraj enketoj. Ankaŭ la vizitantojn estas devige regali per kafo. Ni kafotrinkas en malvarma vetero, en sufoka varmego, se ni estas lacaj, kaj se ni bonfartas, unusolaj kaj en societo, en ĝojo kaj malĝojo. Do, de mateno ĝis malfrua nokto ni multfoje diras: MI PETAS TASON DA KAFO!

— eta —

MENCIINDE

Fantastan informon publikigis la ĵurnalo ELŐRE, aperanta hungarlingve en Bukareŝto. Profesoro de agrarteknika ĉeflernejo en Balázsfalva trovis tian pirarbon, kiu dufoje fruktodonas jare. Per la plimultigo kaj plibonigo de la pirarba speco li estigis ĝardenon, kie, en la kvara jaro, la arboj jam fruktis dek unu fojojn jare. La arboj, laŭ la sciigo, refloras post ĉiu dekdua tago, kaj el ilia dek unu fruktadoj ĝisaŭtunaj, la fruktoj plene maturiĝas 5 aŭ ses fojojn. La piroj estas tre bongustaj kaj ilia pezo ofte superas duon-kilogramon.

Laŭ Paris Match, sesjara infano komprenas 3560 francajn vortojn, poste la intelekt-evoluo estas multe pli malrapida. Kial? Laŭ la gazeto la instrua metodo kulpas pri tio. En kelkaj landoj, kie la metodo estas ankoraŭ pli malbona, la infanoj ankoraŭ pli malrapide evoluas intelekte. La teoria gramatiko ne progresigas, sed malakcelas la evoluon. Nur bona pedagogia reformo povus ĉesigi la malfacilaĵojn.

Inter la menciindaĵojn sin proponas, ke en THE BRITISH ESPERANTIST ree nin regalas Marjorie Bulton *per sia tiel plezuriiga memironio, humurante pri tio, kiel amuzajn stumblojn ŝi metas inter siaj dommastrinaj taskoj; vere oni povas admiri ŝian fortan animon, kiu povas elporti ĉion ĉi. Laŭdinda estas ankaŭ la recenz-rubriko: la redakcio ŝajnas konscii pri tio, ke la sola akiraĵo de la kompatinda E-ista aŭtoro estas la kompetenta kaj konscienca recenzo, kaj ĝi estas ankaŭ la sola instigilo, ĝi estas la sola eblo, el kiu la verkinto povas konstati, ke iu tamen ellegis lian libron.*

Hungara Ŝtata Pupteatro en Zagreb

Sur la malgranda scenejo aperas la ĉefredaktoro kaj vendisto de la gazeto Turbo: „Jen la Turbo, la Turbo!... Teruraj aferoj okazadas nuntempe en nia Ludilurbo! Kvankam kiel bele ni vivis ĝis nun, kaj nun, jen kion ni devas travivi! De tamburisto Bruno Brumbrum oni ŝtelis la mielpoton! Malaperis tabuleto da ĉokolado!" — Tiel sciigas la novajn sensaciojn Hugo Hundo, la menciita ĉefredaktoro kaj gazetvendisto.

En la spektejo 200 scivolemaj infanoj aŭskultas, atendas, kio okazos. Kaj kiam malaperas anasido Pufpufo, ili ekscitiĝas: kiu povas esti la kulpulo. Ĉu la maljuna Ludoviko Lupo, ĉu la simpatia Hugo Hundo, aŭ mem Vilĉjo Vulpo, la detektivo? ...Ĉi tio okazis dimanĉe en la lasta tago de Pupteatra Internacia Festivalo en Zagreb. Infanoj venis post la rumana, bulgara, pola, jugoslava, pupteatroj por rigardi ankaŭ la hungaran.

Ses infanoj en la tria vico estas anoj de la internacia infanĵurio, ili decidos, kiu grupo ricevos la unuan premion de la festivalo.

Ĉiujare ekde 1968 kolektiĝas en Zagreb pupteatraj trupoj por amika konkurado; ili elektis Esperanton kiel komunan lingvon. Grava kondiĉo de la festivalo estas havi belan Esperantan tekston, kaj klare elparoli. Ekzistas ankaŭ aparta lingva ĵurio juĝi pri la beleco de la Esperantaj tekstoj, kaj prononco. La tria ĵurio konsistas el fakuloj de pupteatroj.

La unuan esperantlingvan pupteatraĵon prezentis la Hungara Ŝtata Pupteatro, okaze de la 51 U.K. en Budapest, kun la titolo: „La sorĉa fajrilo." Ĝi havis grandan sukceson kaj instigis entuziasman grupon de jugoslavaj junuloj organizi pupteatran festivalon en Zagreb. De tiam la Esperanto-Klubo en Zagreb — kies anoj estas gejunuloj — atingis, ke la festivalo ĉiujare fariĝu pli altnivela kaj pli bone organizata. La junulojn helpas Tibor Sekelj, financan helpon ili ricevas de la Urba Konsilantaro, kaj de uzinoj.

La hungara trupo en 1968 ricevis de la infanĵurio la duan premion, kaj en la dua jaro la unuan premion. En 1970 partoprenis en ĝi el Hungario nur Roberto Bánki, prezentante ombroludon. En 1971 hungaroj prezentis infankrimion: Mistero en la anasejo. La scenaĵon verkis Julio Urbán, tradukis Roberto Bánki, la reĝisorino estis Anna Bánd. Estas menciinde, ke Tibor Sekelj, aŭskultante la hungaran prezentadon, diris, ke tiu trupo estas la sola, kies anoj tiel bone kaj bele prononcas Esperanton, ke ne estas rimarkebla la nacieco de la geaktoroj.

Mi konversaciis kun reĝisorino Anna Bánd pri tio, kiel ŝi atingis, ke ĉiuj anoj de trupo tiel flue kaj bele parolas Esperanton. La solvo estas simpla: ekde komenco la samaj geaktoroj ludas kune. Ili diligente studis la lingvon kaj la provoj okazas ĉiam Esperante. Ĉiuj reĝisoraj instrukcioj aŭdeblas nur esperantlingve; la geaktoroj demandas kaj parolas same nur Esperante.

Se iu ne komprenus iun esprimon, li rajtas demandi, kion ĝi signifas. Se hazarde iu parolas hungare, devas pagi „punon". Sed plej grava estas la sindona laboro. La geaktoroj povas provi nur krom la labortempo, ofte nokte, kiam oni povas havi liberan scenejon.

Resume: la hungara spektaklo plaĉis al infanoj, ĉar la agado estis interesa por ili, la pupoj estis ĉarmaj, simplaj gantpupoj, kaj — kiel ankaŭ la fakĵurio menciis, estas laŭdinde, ke ili ne klopodis gajni per kuriozaj teĥnikaĵoj, sed per bona ludado.

Mi parolis nur pri Hungara Trupo, sed ĉiuj trupoj meritus apartan artikolon, ĉiuj donis vere artan ĝuon al infanoj kaj plenkreskuloj. Tre interesa kaj moderna estis la spektaklo de Poznan, ĉefe por dekkelkjaraj kaj plenkreskuloj. La eldonitaj tekstoj havas grandan signifon en la porinfana literaturo, ni devus popularigi ilin.

En oktobro denove okazos Pupteatra Internacia Festivalo. Tisljar Zlatko kun aliaj bravaj gejunuloj jam laboras en Zagreb, la trupoj en diversaj landoj komencis la provojn. Ni pensu ankaŭ pri tio, kiel la Esperanto-movado povus doni pli da helpo kaj atento al tiu elstara teatra kaj literatura okazaĵo.

Gabriella Ősz

Kiu bone scias arablingve...

Kelkaj jam diris al d-ro prof. Gyula Germanus, nia fama scienculo-orientalisto, ke verŝajne li estas la ununura hungaro, kiun oni ne povas ĉikani per la konata hungara proverbo: kiu ne scias arabe, ne parolu arabe. Nu, al tia rekono foje li jene respondis:

— Estas bone al tiuj, kiuj sekvas tiun ĉi admonon, kaj ne parolas arabe.. Bedaŭrinde, mi devas ofte paroli arabe, jen kun araboj venintaj al Budapeŝto, jen en Egiptio, se oni petas min prelegi tie. Sed en la hoteloj la kelneroj ne estas kleraj homoj. Kvankam mi komprenas ilian dialekton, ili miskomprenas mian literaturan lingvon, la lingvon de Korano. Pro tio kelkfoje mi tiel sentas, ke vane mi lernis dum kvindek jaroj la araban lingvon. Foje ekzemple mi petis de la kelnero glaciaĵon, kaj li portis al mi — salujon. Alian fojon mi petis de li kuiritajn maizo-grapolojn, kaj pli nova surprizo trafis nin. Nome mia edzino — kiu per siaj mansignoj jam multfoje superpontis niajn lingvajn malfacilaĵojn — montris al li, kiel ni kutimas manĝi ilin, je kio anstataŭ maizon li alportis — buŝharmonikon.

Kolektis: *Imre Szenes*

NIA JARDEKO



Hungara Vivo pasintjare finis la dekan jaron de sia ekzistado. Nun, komence de la dua jardeko ni ĵetas rigardon al la jaroj pasintaj, primemorante kelkajn kunlaborantojn de nia revuo; krome troviĝas en la enigmo nomoj de aŭtoroj, kies originalajn aŭ tradukitajn verkojn ni aperigis, aŭ pri kies laborado ni publikigis artikolon dum tiu jardeko.

Por la solvo oni utile povos uzi la malnovajn numerojn kaj la enhavtabelon aperintan en Hungara Vivo 1971/2 kaj 1971/3.

Ensendi sufiĉas la solvon de vicoj:
1., 8., 79., 81., 91. horizontalaj, kaj
1., 8., 10., 46., 49. vertikalaj.
Inter solvintoj ni lotumos premiojn.

HORIZONTALAJ VICOJ:

1. La unua ĉefredaktoro de HV, ankaŭ nun ĉefkunlaboranto. Profesoro, aŭtoro de Esperantaj kaj stenografiaj lernolibroj, kunlaboranto de Enciklopedio. La esperantista legantaro multe ŝuldas al lia oferema laboro. (En la lasta kvadrato staras komenclitero de baptonomo.) 8. *Ekde 1968. ĉefredaktoras Mihály Gergely verkisto, „József Attila" premiito. Aŭtoro de romanoj, novelaroj, kunlaboranto de ĉefaj hungaraj literaturaj revuoj. Verkas ankaŭ esperantlingve. Unu el liaj originalaĵoj (aperis en HV 1968/2.)* 14. Agis 15. Senvalora, malbela 16. ALÁ 17. Organika teksaĵo, ligilo inter cerbo kaj sentorganoj. 18. Germana virina nomo. 20. Sufikso esprimanta ripetiĝon. 21. Virina vestaĵ. 23. Artikolo. 25. Kiamaniere? 26. Oksigeno kaj jodo. 27. Aparato konservi atmosferon de ejoj en kondiĉoj higienaj kaj en egala modera temperaturo. 31. Sufikso por derivi frakcian numeralon. 32. Hungara verkisto, poeto „József Attila"-premiito. Poemo aperis de li en HV 1969/2. (En la unua kvadrato staras komenclitero de baptonomo — Sándor.) 34. Frap'. 35. Hungara roman- kaj dramverkisto, „Kossuth"-premiito. HV publikigis intervjuon kun li, kaj parton el lia Tolstoj-eseo (en la unua kvadrato komenclitero de lia baptonomo — László). 38. Fandita besta gras'. 39 Duono de sitelo! 40. Ar' da konfuzaj sonoj. 41. Vasta etendaĵo de sala akvo. 42. Dependiga konjukcio. 44. Deflankiĝi de la vero, malĝuste opinii. 45. Fama hungara arkitekto estis, (Miklós; 1814—1891). Laŭ liaj projektoj konstruiĝis ankaŭ la Budapesta Operejo. En HV verkis artikolon pri lia arto Tibor Ujlaky-Nagy. 47. Numeralo. 49. Horizontala tabulo por surmeti objektojn. 50. NB. 52. La plej alta perfekteco (en la kvaran kvadraton skribu „Á" anstataŭ „A"). 55. Obeema persono. 57. Konjunkcio. 58. Produktaĵ' de birdoj. 60. Infanmanĝanta legenda giganto. 62. Kolora fluaĵo uzata por skribi. 63. Refleksivo. 64. Ano de redaktoraro de HV; kuracisto, scienca kunlaboranto. Tradukadas el pluraj lingvoj; kiel esperantlingvan poeton HV prezentis lin (1969/3). 66. Kondiĉo por konveni al nuntempo. 68. Infanterian' de franca afrika armeo. 70. Romia imperiestro (p. K. 54—68). 72. Disrompi terbulojn. 74. Komenco de 30. vertikala. 75. Karbo kaj nitrogeno. 76. Verba sufikso. 78. Arb' el familio kupuliferoj (fagus). 79. *Aktive kontribuis al la laboro de HV ankaŭ tiu granda E-a poeto, verkisto, mortinta antaŭ kvin jaroj (En la unua kvadrato komenclitero de baptonomo).* 81. *Hungara scienculo, universitata profesoro. Adepto de Esperanto, ĉefkunlaboranto de HV. En HV okupiĝis ĉefe pri E. kiel teĥnika-scienca lingvo (64/1., 67/1., 69/3.)* 83. Plej granda poeto de la XX jarcenta hungara literaturo; Pluraj poemoj aperis de li en HV 63/2. (En la lasta kvadrato staras komenclitero de baptonomo — Endre.) 84. Virinan vestaĵon. 88. Stato post troa penado. 90. Nedifinita persono. 91. *Prezidanto de HEA, responda redaktoro de HV; aŭtoro de pluraj priartaj, kulturhistoriaj artikoloj.* 92. Konjunkcio. 94. Universala Kongreso. 96. Literatura Mondo. 98. Fama hungara muzikisto, violonartisto; gajninto de pluraj internaciaj muzikaj konkursoj (Albert). 99. Kiel la vico 92. 100. Fero. 101. Ĉefurbo de Peruo. 103. Persona pronomo en akuzativo. 105. Laŭvorte ripeti. 107. Reprodukta organ' de kriptogamoj. 109. Sudafrika poeto Esperanta, en „Gasta Paĝo" de HV aperis de li poemoj (69/3). 110. Redaktorarano de HV, aŭtoro de lingvistikaj artikoloj. Inter 1961—68 li kontribuis al preskaŭ ĉiu numero. 111. Aurél...-Thewrewk: astronomo, kunlaboranto de nia revuo, HV prezentis lin kiel esperantlingvan poeton (69/1).

VERTIKALAJ VICOJ:

1. „Granda Oldulo" de Esperanta literaturo, kun juneca aktiveco helpas la redaktadon, zorgas pri lingva revizio. Lia laborado en la du vicoj eĉ ne taksebla, meritus apartan numeron. 2. Hungara verkisto (Ferenc), tradukita prozaĵo aperis de li en HV 65/2. 3. Demanda tabelvorto. 4. ÊS. 5. Punkto de la ĉiela sfero, troviĝanta sub la piedoj de observanto. 6. YĈ. 7. La bandito. *8. Eminenta hungara poeto estis (Mihály), aŭtoro de „La Cikonikalifo" — tradukita de Bodó; liajn poemojn aperigis HV 64/3.* 9. Prepozicio. *10. Ano de redaktoraro de HV, novelisto. Kunlaboras ankaŭ al Hungara Fervojista Mondo.* 11. Prepozicio. 12. Ŝovi la langon sur io (Radiko). 13. Muzika ritma melodio. 18. Konjunkcio. 20. Ĉiu ekstrema flanko (anstataŭ „O" staras „Ó"). 22. Oksigeno kaj tantalo. 24. ALÉ. 27. Fabela estaĵo gardanta la trezorojn de la montoj. 28. Persona pronomo. 29. Malnova nomo de Ĉeĥoslovakia urbo Gottwaldov (ZLIN). 30. Kontraŭpluva portebla ŝirmilo. 32. Hungara poeto, tradukisto, sekretario de Asocio de Hungaraj Verkistoj, „Kossuth" premiito. Liaj poemoj aperis en HV 64/3; 69/3. 33. Membroŝtat' de Jugoslavio. 36. Greka muzo de amo. 37. Germana poeto (1797—1856), liajn poemojn aperigis HV 61/3—4 kaj 62/1 en traduko de Kalocsay kaj Waringhien. 43. Sufikso esprimanta parton de tuto. 44. Vegetaĵo kun flavaj fortodoraj floroj, uzata por salato. *46. Ĉefkunlaboranto de HV, poeto kritikisto. Zorgas pri rubriko „Revuo de revuoj".* 48. Tabelvorto. *49. Membro de re-*

daktoraro. Debutis per poemoj, tradukoj. Eseisto, plej grandan reeĥon rikoltis lia Baghy-eseo. 51. Remaĉanta kornbest'. 53. Tre granda. 54. Part' asignata al iu per sorto. 56. Parto de bieno! 57. Kiel la vico 3. vertikala. 59. Penadi por akiri soldatojn, membrojn, adeptojn. 61. Artikolo. 63. Supraĵo. 64. Membroj. 65. RO. 67. Unu apartenaĵo de vestaĵo. 68. ZE. 69. Ano de redaktoraro, agas ankaŭ en Propaganda Komitato de HEA, verkis plurajn artikolojn por HV (ekz. en 69/1). 71. Esperanta poeto, hungaro (1902—1961), liaj poemoj aperis en la unuaj jaroj en HV. 73. Titolo de oficiala organo de MEM. 75.... Guevara: latinamerika revoluciulo estis. 77. Rezult' de maĉo. 80. Hungara urbo, loko de SEU. 82. Kunlaboranto de HV, gimnazia profesoro, publikigis artikolojn kaj poemtradukaĵojn, ekz. en HV 70/2, (Péter). 84. Profesoro, lingvisto, aŭtoro de prilingvaj artikoloj kaj eseoj (Ferenc), HV 68/2. 85. Hungara urbo, loko de TEJO-Kongreso en 1966. 86. Okupo, profesio. 87. Nitrogeno, fluoro kaj silicio. 89. Poeto, reprezentanto de „Skota Skolo", liaj poemoj aperis en HV 68/2, 69/1, verkis ankaŭ artikolojn por nia revuo. 95. Tabelvorto. 97. — 1099 — per romiaj ciferoj. 99. Supernatura estaĵo. 100. Prepozicio. 102. MK. 104. Loka Komitato. 106. TP. 108. Italia rivero.

Kompilis: 93. vertikala

***

Dum la kompilado de nia enigmo, aperinta en HV 71/4 sub titolo „Espero en Esperanto" ni faris bedaŭrindan eraron. Anstataŭ la teksto:

Kaj kiel la plej b e n a n ter-donacon
Vi almiriĝas tuthomaran pacon

ni citis: „Kaj kiel la plej b e l a n..." Ankaŭ la perpendiklajn vicojn ni difinis laŭ tiu malĝusta citaĵo. Ĉi-loke ni diras dankon al la solvintoj, kiuj alvokis nian atenton al tiu eraro, samtempe ni petas de niaj legantoj pardonon, kaj — ne lastfoje — tiun de la poeto. Per tiu ĵus menciita eraro ni akceptis ĝusta la solvojn en ambaŭ formoj.

Inter la solvintoj gajnis libropremion: -F-ino N. Hanson, 102 Vegal Crescent, Halifax HX3 5NX. *Anglio;* Ilse Neumann 88 Zittau, Löbauer strasse 14, el *GDR;* Sándor Varga, Ráckeve, Kossuth u. 78., el *Hungario.*

Ĝustan solvon ensendis ankoraŭ: — Atanas Gaevel *Bulgario;* Lauri Lehtola el *Finnlando;* Frohmut Kaller, Rainer Fischer, d-ro Karl Schulze, Klaus-Dieter Dungert, d-ro J. Kondor el *DDR;* Maria Groschowka kaj Jerzy Banacki el *Pollando;* Julio Szabó el *Rumanio;* Hugo Löfgren el *Svedio;* Viktoro Arolović, Valdis Gulbis kaj Rein Kiviaru el *Sovetunio;* József Bíró, István Bodnár, István Csató, Georgo Csüllög, Róza Halász, Teodoro Kereszthegyi, János Kiss, Karlo Magyari, Antal Szakáll, András Wágner, Karlo Törtely, József Kardos, Béla Medgyes el *Hungario.*

Ĉu ekzistos vivo post la naskiĝo?

Artikolon de la Nobelpremiita profesoro ALBERT SZENT-GYÖRGYI publikigis la gazeto *New York Times* sub la supra titolo. Enkonduke la profesoro konstatas, ke inter la diversaj grupoj de la homaro, inter la nacioj ne ekzistas malamikeco, ankaŭ inter la popoloj de Usono kaj Sovetunio estiĝis sincera simpatio kaj estimo.

„Kie do estas la malamiko? Kiu estas la malamiko?" — demandas Szent-Györgyi, kaj li daŭrigas jene: — „Ie tamen devas ekzisti malamiko kaj instigi la popolojn, ke ili investu la fruktojn de sia laboro en armilojn. Sed la malamikeco, la streĉo troviĝas ne inter la popoloj. Sole inter iliaj registaroj ĝi troviĝas. Sajnas, ke la registaroj sekve de sia naturo ŝanĝas amikajn popolojn en malamikojn. Nia registaro laste provis veki malamikajn sentojn kontraŭ nia malnova amiko Hindujo, unu el la plej granda demokratio, por ke ĝi starigu nin al la flanko de malluma diktatoro, anakronisma amasmurdisto. Nur la registaroj malamikadas, ne la popoloj. La popolo de Norda Vjetnamo estas prefere nia amiko ol malamiko, dum la korupta, antidemokratia registaro, por kiu ni rezignis nian nacian unuecon kaj venis sur la randon de abismo, estas malamiko de tiuj baz-principoj, sur kiuj konstruiĝis nia propra patrio."

Plue la profesoro skribas pri tio, ke ĉiam estas tragike vidi de proksime la morton, sed sur la supro de la potenco eĉ milionoj da mortoj estas nur statistika indiko. „Tiamaniere — li aldonas — farmulo de Texas, kiu ekiris al suproj de la potenco kun la revo de la „granda socio" baldaŭ komencas militon, kaj advokato de Wall Street ĝin plu disvolvas. Aŭ temas eble pri tio, ke sole milita gloro povas kontentigi la ambicion de la riĉa farmulo kaj sukcesa advokato, kiu fariĝis subite ĉefarmeestro de la plej granda milita forto de l' mondo?

„Niaj malamikoj do estas la registaroj, iliaj armeoj kaj la militistaj-industriaj kompleksoj, kaj ne la popoloj" — emfazas Szent-Györgyi, poste li eksplikas:

„Precipe malprudenta estas la malamikado pro tio, ke la homaro vere havas tiajn mortajn malamikojn, kontraŭ kiuj oni povas ekmiliti nur per kunigitaj fortoj, en plena akordo. Jen estas la diversaj (termikaj kaj materiaj) malpurigoj, kiuj la terglobon povos fari neloĝebla. Jen la tropopolumo kaj la elĉerpiĝo de niaj tre limitaj rezervoj. Kaj troviĝas tiaj vundoj sur la korpo de la homaro, kiel la vjetnama milito kaj la proksim-orienta streĉo, kiuj minacas per ĝenerala infekto kaj kies likvido estas brule urĝa. Por la naturo necesis tri miliardoj da jaroj, ĝis la homan vivon ĝi perkonstruis, kaj estus la plej granda, la plej ekstrema stulto, puŝi en danĝeron ties plu-daŭron. La problemo numero unu estas ne la repremado de la komunismo, sed tio, kiel bridi la trokreskon de la militarismo kaj registar-potenco.... Nun ne tio jam estas la ĉefa problemo, ĉu ekzistas vivo post la morto, sed tio, *ĉu ekzistos vivo post la naskiĝo"* — skribas konklude Albert Szent-Györgyi.

Kompletigu la jarkolekton de Hungara Vivo!

Multaj niaj legantoj demandis letere kaj persone, kiel kompletigi la jarkolekton de HV? Ni havas ankoraŭ malnovajn ekzemplerojn, kvankam ne el ĉiuj numeroj; ili estas mendeblaj aŭ aĉeteblaj de Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, VIII. Kenyérmező u. 6. Prezo de unu ekzemplero estas: el la jaroj 1964—1968: 2 forintoj (O. 20 dolaro), el 1969 5 forintoj (O. 40 dolaro), el 1970 kaj 1971 8 forintoj (O. 50 dolaro). Poŝtkosto de unu ekzemplero: 1 forinto, eksterlande O. 20 dolaro aŭ egalvaloro alivaluta.

LETERKESTO

Ĝojiga informo: Hungara Esperanto Asocio planas aperigi nian revuon ekde januaro 1973 jare sesfoje, do Hungara Vivo aperus en ĉiu dua monato. Definitivan numero de HV.

Okaze de novjaro al niaj lastaj numeroj ni ricevis bondezirojn kaj gratulojn: Atanas Gaev el *Bulgario;* Eduard V. Tvarozek, Miroslav Hromas, Jindrich Tomišek el *Ceĥoslovakio;* s-ro. A. Bongars el *Francio;* d-ro Martin Schüler, Klaus-Dietr Dungert, Rainer Fischer, Otto Breuer el *DDR;* Maria Grochowska el *Pollando;* Julio Szabó el *Rumanio;* Noore Vahter, Teodoro Kulagin, Saulcerite Neilande, Ignaco Kovalevskij, Aleksander Bogdanov el *Sovetunio;* István Temesi, „Vörösmarty" Esperanto Fakrondo, Jozefo Rabi el *Hungario.* Sinceran dankon al ĉiuj, kaj ankaŭ ni sendas tutkoran bondeziron.

***

Al multaj. — Kiel vi scias, okaze de la ĉijara Hungara Kulturfestivalo Hungara Vivo estas oficiala organo de Kulturfestivalo. Precipe dum la laboro de 72/2-a numero niaj kunlaborantoj, legantoj skribis kaj sendis multegajn artikolojn, alparolojn. Tial ni ne povas respondi al ĉiuj nun en ĉi tiu rubriko. Ni petas pardonon kaj paciencon.

***

„Karaj amikoj ĉe Hungara Vivo! Hodiaŭ mi ricevis jarfinan HV. Ĉiam mi ĝuas la HV, sed iel ĉi lastan numeron mi trovis eksterordinare bona. Viaj literaturaĵoj kaj priart(ist)aj artikoloj, via hungara ĉarmo, kiu tiel evidentiĝas ĉie en la revuo — ĉiuj ĉi tiuj kaj aliaj ecoj tro multnombraj por listigi, faras vian revuon la plej bona kaj la plej respektinda en Esperantio. Mi bedaŭras diri, ke la via estas eble la sola, kiun ni havas, kiu rajtas esti komparata eĉ kun la altrangaj nacilingvaj revuoj de la sama speco.

Aŭ ĉu mi eraris tie... ĉar nenie troviĝas alia revuo de ĝuste la sama speco kiel la via. Hungara Vivo estas unika, kaj mi dankas al vi, ke vi provizas la eblecon al mi kelkfoje dum la jaro (sed ne sufiĉafoje) naĝi en oceano de la hungarumado... Allan E. Fineberg, Usono." (Dankon por via, ĉarma letero. Viajn aliajn petojn mi jam aranĝis, kaj publikos vian korespondopeton.)

***

„Mi ĝoje esprimas mian ŝaton al Via (kaj ankaŭ nia) bonega gazeto, Hungara Vivo. Maleble estas ĉiujn dezirojn de la legantaro plenumi, tamen Via laborego estas sendube sukcesa kaj fruktodona, ĉar riĉa enhavo de HV donas al ĉiu leganto kaj amuzon, kaj valorajn informojn. Mi alte pritaksas la enhavon kaj ankaŭ la formon, mienon, de la HV. Ekzemple esperantlingvaj reklamoj (de tempo al tempo diskutataj) *ŝajnas al mi ne nur necesaj, sed ankaŭ tre utilaj, ĉar fakte ankaŭ propogandas la internacion lingvon — per moderna stilo.* Kaj esceptaj preseraroj (ekz. en HV 1971/4. numero, la reklamo pri motorcikloj Pannonia) en neniu kazo povas malvalorigi tiun vojon. El vidpunkto de konoj de E. mi ankaŭ alte taksas regulan aperadon de krucvortenigmoj en HV. Kun ĝojo mi elmetas solvojn de la antaŭlasta kaj de la lasta... Ing. Karel Faltejsek, Praha-Nusle, U novych domu II/5. Ĉeĥoslovakio."

Ni informas niajn Legantojn, ke nia ĉi-jara kvara numero estos memornumero okaze de la 50-a datreveno de la apero de LITERATURA MONDO.

La Redakcio petas ĉiujn komuniki al ni sugestojn, ideojn kaj eventuale ankaŭ rememorojn pri la revuo aŭ eldonejo.

Ni povos utiligi nur sendaĵojn, kiujn ni ricevos antaŭ la l-a de julio.

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

1972. XII-a jaro, 2-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro: *d-ro Jozefo Mátéffy*
Lingva revizio: *K. Kalocsay*
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
d-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Csiszár, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy, Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrek, Mária Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Újlaky-Nagy, Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:
D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

La redakta komitato la unuan ĵaŭdon de ĉiu monato posttagmeze de la tria ĝis la kvina horo havas akceptotagon. (Bp. VIII., Kenyérmező utca 6.)

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.
Telefono: 224-819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I., Budapest, V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per ĉekenpagilo, por individuaj abonantoj la ĉeknumero estas 61 280, por neindividuaj 61 066.

La abono estas por jaro Ft 32,—, al eksterlando krome Ft 6.40 poŝtelspezo.

72.7569 Békés megyei Nyomdaipari Vállalat, Gyula
Indexszám: 25.377

MEDICOR MEDICOR

MEDICOR BUDAPEST

Miniatura jonizatoro
MEDICOR

Certigas la etan negativan jon-supernombron en la aerspaco de aŭtomobilo.

Ĝiaj efikoj: kreskas la sango - PH (bazeca proporcio-ŝanĝo),
malaltiĝas la sangotensio,
malpliiĝas la oksigenkonsumado de la organismo,
pliiĝas la diseriĝo de serotonino ktp.

Resume: la negativa jon-efiko montras psikologie trankviligan influon al la vegetativa nervosistemo, ekonomiiganta la vivprocezon.

Jonizatoro: kreskigas la kapablon por koncentrado,
plibonigas la ĝeneralan farton.

Medicor jonizatoro estas vendata de la Etkomercaj vendejoj de Aŭto-kaj Maŝinparto-komerca Entrepreno. (Autó- és Alkatrészkereskedelmi Vállalat)

Ĝi estas ricevebla por 6 kaj 12 voltoj.

MEDICOR MEDICOR

NOVA HUNGARA INVENTAĴO

la patento de Industria Instrumentfabriko, la aŭtomata mansekigilo THERMOFLUX.
La aŭtomata mansekiga aparato THERMOFLUX estas eminente taŭga eu la manlavejoj de publikaj konstruaĵoj, hospitaloj, kuracistaj konsultejoj, ambulancoj, hoteloj kaj restoracioj, en lernejoj kaj edukinstitutoj, do en ĉiu loko, kie individuaj viŝtukoj ne estas aplikeblaj por higiena mansekigado.

Thermoflux, la aŭtomata mansekigilo havas modernan konturon, estas konstruita en plastan ujon, estas eminentkvalita, fidinda en la funkciado kaj certigas perfektan sekigadon en mallonga tempo.

Fabrikanto: Industria Instrumentfabriko

Vendanto: RAVILL Komerca Entrepreno
kaj la
Provincaj Fero-, kaj Teknikaj
Komercaj Entreprenoj.

THERMOFLUX

COFIM

Superbela formo,

plaĉa ellaboro,

kara donaco:

COFIM

kafmuelilo,
fulmrapida,
sekura,
ornamo de la kuirejo.
Fabrikanto: Ipari Műszergyár
(Industria Instrumentfabriko)

Ricevebla: en Magazenoj, Keravill- vendejoj,
Fer-, kaj Teknikaj fakvenejdoj,